7. Ne la papilio ne estas sur la infano. La papilio estas sur la floro.
8. Ne, la infano ne sidas sur la arbo. Li sidas sub ĝi.



پ. کامل کنید


1. La infano ne **staras**. La infano **sidas**.
2. La papilio flugas per la **flugiloj**. Ĝi ne **estas** sur la floro.
3. Li ne **estas** sur la arbo. Li estas **sub** la arbo. La **papilio** estas sur la arbo.
4. La infano **flaras** per la nazo. Li flaras la **floron**.



درس پنجم: آشنایی با کلمات ترکیبی

5-a Leciono: Kunmetitaj Vortoj de Esperanto

	La koko kantas sur la arbo.	Kie kantas la koko? Ĉu la koko estas sur la floro?
	La kokino estas antaŭ la kokidoj. La kokidoj estas malantaŭ la kokino. <u>Antaŭ</u> <u>Mal.antaŭ</u>	Kie estas la kokidoj? Ĉu la kokino estas malantaŭ la kokidoj?
	La infano manĝas la pomon. <u>Kio.n</u>	Kion manĝas la infano?
	La pom-arbo <u>Pomo-arbo = pom-arbo</u>	Kio estas tio? - Tio estas pomarbo
	La pir-arbo <u>Piro-arbo = pir-arbo</u>	Ĉu tio estas pomarbo? -Ne, tio ne estas pomarbo. Tio estas pirarbo.
	La infano sidas sub la pirarbo.	Kie sidas la infano? - Li sidas sub la pirarbo.

	La papilio estas sur la pomarbo.	Kie estas la papilio? Ĉu la papilio estas sur la pirarbo?
	La infano sidas inter la pomarbo kaj pirarbo. → inter ←.	Kie sidas la infano? Ĉu li estas sur la arbo?
	La kokidoj estas inter la koko kaj kokino.	Kie estas la kokidoj? Ĉu la koko kaj kokino estas inter la kokidoj?
	La gekokoj estas inter la arboj. Ge.kok.o.j	Kio estas inter la arboj? - La gekokoj estas inter la arboj. Ĉu la arboj estas inter la koko kaj kokino? Ĉu la gekokoj estas sur la arbo?
	Alta arbo Kia	Kia estas la arbo? - La arbo estas alta. Kia? —a (alt.a) Kio estas alta? - La arbo estas alta.
	Malalta arbo Mal.alt.a	Ĉu la arbo estas malalta? - Jes, la arbo estas malalta. Ĝi estas malalta.

	La papilio sidas sur la malalta arbo	Sur kio sidas la papilio? - Sur la arbo sidas la papilio. Sur kia arbo sidas la papilio? - Sur alta arbo sidas la papilio.
	La infano staras sub malalta arbo.	Ĉu la infano staras sub la malalta arbo? Kie staras la infano? Ĉu li sidas sur la arbo?
	La patro, la patrino, kaj la infano = La familio	Ĉu la familio sidas? Ĉu la familio flugas? Ĉu la infano staras inter la gepatroj?
	La patro + la patrino = la gepatroj La gepatroj estas altaj. Ge.patr.o.j Ge.kok.o.j	Kiaj estas la gepatroj? - Altaj estas la gepatroj. La gepatroj estas altaj.
	La infano estas malalta.	Kia estas la infano? - Malalta estas la infano. Li estas malalta. Ĉu la infano estas alta?
	La patrino venas. Ŝi venas.	Kion faras la patrino? - La patrino venas. Ŝi venas.

	La patro iras. Li iras.	Kion faras la patro? - La patro iras. Li iras.
	La infano iras al la arbo. Al = →	Ĉu la infano iras al la arbo? - Jes, la infano iras al la arbo. Li iras al la arbo. Li iras al ĝi.
	La papilio flugas al la floro.	Kion faras la papilio? - La papilio flugas. Al kio la papilio flugas? - La papilio flugas al la floro.
	La kokidoj iras post la kokino. Ili iras post ĝi. Post	Kion faras la kokidoj? - La kokidoj iras post la kokino. Post la kokino iras la kokidoj.

مطالبی که در این درس آموختیم

1- برای ترکیب دو کلمه با یکدیگر و ساختن واژه‌ای جدید، کلمه‌ی اصلی را در انتهای واژه‌ی ترکیبی قرار می‌دهیم، مانند:

کلمه‌ی اصلی		کلمه‌ی فرعی		کلمه‌ی ترکیبی	
اسم	معنی	اسم	معنی	اسم	معنی
arbo	درخت	pomo	سیب	pomoarbo	درخت سیب
arbo	درخت	piro	گلابی	piroarbo	درخت گلابی
pomo	سیب	tero	زمین	ter-pomo	سیب زمینی
vojo	راه	fero	آهن	fervojo	راه آهن

همان‌طور که مشاهده شد، هر کلمه‌ی ترکیبی را می‌توان به چهار طریق متفاوت نگاشت، که از نظر معنایی یا دستوری هیچ تفاوتی با یک‌دیگر ندارد:

چهار طریق متفاوت نگاشتن کلمات ترکیبی				معنی آن
pomo-arbo	pomoarbo	pom-arbo	pomarbo	درخت سیب
tero-pomo	teropomo	ter-pomo	terpomo	سیب زمینی

- برای آشنائی بیشتر با ساختار کلمات پایانه‌دار در زبان اسپرانتو به بخش 4 در بخش مرجع دستوری زبان اسپرانتو در سمت راست کتاب نگاه کنید.

2- حرف اضافه‌ی antaŭ به معنی (در) جلوی، و حرف اضافه‌ی inter به معنی (در) بین است، مثل:

La koko estas antaŭ la arbo.	خروس (در) جلوی درخت است.
La kokino kaj kokidoj estas antaŭ la infano.	مرغ و جوجه‌ها (در) جلوی کودک است.
La ovoj estas inter la koko kaj kokino.	تخم‌مرغ‌ها (در) بین خروس و مرغ است.
La papilio sidas inter la floro kaj arbo.	پروانه (در) بین گل و درخت نشسته است.

- برای آشنائی بیشتر با این حرف اضافه، و دیگر حرف اضافه‌های زبان اسپرانتو به قسمت 4-5 در بخش مرجع دستوری زبان اسپرانتو در سمت راست کتاب نگاه کنید.

3- حرف اضافه‌ی post به معنی (در) پشت و (به) دنبال، و al به معنی به (سوی) یا به طرف است، مثل:

La koko iras post la infano.	خروس (به) دنبال کودک می‌رود.
La kokino kaj kokidoj iras post la koko.	مرغ و جوجه‌ها (در) پشت خروس راه می‌روند.
La infano iras al la kokidoj.	بچه به سوی جوجه‌ها می‌رود.
La papilio flugas al la floro.	پروانه به طرف گل پرواز می‌کند.

- برای آشنائی بیشتر با این حرف اضافه، و دیگر حرف اضافه‌های زبان اسپرانتو به قسمت 4-5 نگاه کنید.

4- هم‌بسته‌ی پرسشی kia به معنی چگونه است و پایانه‌ی جمع (ـز) و مفعول مستقیم (ـن) نیز می‌تواند در انتهای آن بیاید:

Kia estas la koko?	خروس چگونه است؟
Kiaj estas la kokidoj?	جوجه‌ها چگونه‌اند؟
Kian ovon li manĝas?	چگونه تخم‌مرغی را او می‌خورد؟
Kiajn ovojn ili manĝas?	چگونه تخم‌مرغ‌هایی را ایشان می‌خورند؟

- برای آشنائی بیشتر با این هم‌بسته‌ها، و دیگر هم‌بسته‌های زبان اسپرانتو به قسمت 5-6 در بخش مرجع دستوری زبان اسپرانتو در سمت راست کتاب نگاه کنید.

Ekzercoj	تمرین‌ها
A. Respondu:	الف. پاسخ دهید:

- 1- Ĉu la kokidoj kantas?
- 2- Ĉu la infano estas alta?
- 3- Ĉu la gepatroj estas malaltaj?
- 4- Ĉu la pomarbo iras al la infano?
- 5- Kia estas pirarbo?
- 6- Kia estas pomarbo?
- 7- Kiaj estas la gepatroj?
- 8- Ĉu la kokino iras post la kokidoj?
- 9- Sur kio estas la koko?

B. Priskribu	ب. توصیف کنید:
	1-
	2-

C. Plenigu		ب. کامل کنید:	
	1- La koko sur la arbo. Ĝi estas la arbo.		3- La infano inter la arboj. Li sidas la arboj.
	2- Kio estas tio? - Tio estas Ĝi estas pirarbo.		4- La infano iras la arbo. Li al ĝi.

پاسخ تمرین‌ها

الف. پاسخ دهید

1. Ne, la kokidoj ne kantas. La kokoj kantas.
2. Ne, la infano ne estas alta. La infano estas malalta.
3. Ne, la gepatroj ne estas malaltaj. Ili estas altaj.
4. Ne, la pomarbo ne iras al la infano. La infano iras al la pomarbo.
5. Pirarbo estas malalta.
6. Pomarbo estas alta.
7. La gepatroj estas altaj.
8. Ne, la kokino ne iras post la kokidoj. La kokidoj iras post la kokino.
9. La koko estas sur la arbo.

ب. توصیف کنید




- 1- La patrino kaj la infano staras. Ili ne iras. La patro ne staras. Li iras. La infano malaltas. La gepatroj altas.
- 2- La infano kaj patro ne iras. Ili staras. La patrino ne staras. Ŝi ne sidas. Ŝi venas al ili.


پ. کامل کنید



- 1- La koko **kantas** sur la arbo. Ĝi estas **sur** la arbo.
- 2- Kio estas tio? Tio estas **pomarbo**. Ĝi **ne** estas pirarbo.
- 3- La infano **sidas** inter la arboj. Li sidas **inter** la arboj.
- 4- La infano iras **al** la arbo. Li **iras** al ĝi.

درس ششم: آشنایی با مفعول مستقیم

6-a Leciono: Esperanta Akuzativo

	Ĉu la infano manĝas? - Jes, la infano manĝas.	Kion faras la infano? - La infano manĝas. Li manĝas. Ĉu li trinkas?
	Ĉu la kokidoj trinkas? - Jes, la kokidoj trinkas.	Kion faras la kokidoj? - La kokidoj trinkas. Ili trinkas.
	Ĉu la patrino staras? - Ne, la patrino ne staras. Ŝi sidas.	Ĉu la patrino venas? - Ne, ŝi ne venas. La patrino sidas. Kion faras la patrino? - Ŝi sidas.
	Ĉu la patro venas? - Ne, li ne venas. La patro iras.	Kion faras la patro? - La patro iras.
	La birdo	Kio estas tio? - Tio estas birdo. Ĉu la birdo estas granda?
	La birdoj estas sur la arbo.	Kie estas la birdoj? - Ili estas sur la arbo.

	La nigra birdo	Kia estas la birdo? - La birdo estas nigra. Ĝi estas nigra.
	La blanka birdo	Kia estas la birdo? - La birdo estas blanka. Ĝi estas blanka.
	Nigra kaj blanka birdoj	Ĉu la birdoj estas blankaj? Ĉu la birdoj estas nigraj?
	La blanka papilio	Ĉu nigra papilio estas sur la arbo. Ne, nigra papilio ne estas sur la arbo. Blanka papilio estas sur la arbo. Ĉu ĝi sidas sur pirarbo?
	Du blankaj birdoj flugas. Ili flugas.	Kion faras la blankaj birdoj? - La blankaj birdoj flugas. Ili flugas. Ĉu ili estas nigraj? Ĉu ili estas grandaj?
	Ses birdoj flugas. Ili flugas. 6 = ses	Ĉu ili estas blankaj? - Jes, ili estas blankaj. Ili estas blankaj.


	La patro legas.	Kion faras la patro? - La patro legas. Li sidas kaj legas.
	La libro	Kio estas tio? - Tio estas libro. Ĉu la libro estas malgranda?
	La patro legas la libron. Libr.o.n Kio.n	Kion faras la patro? - La patro legas la libron. Ĉu li manĝas la libron?
	La patrino skribas. Ŝi skribas.	Kion faras la patrino? La patrino skribas. Ŝi skribas.
	La letero	Kio estas tio? - Tio estas letero. Ĉu la letero estas bona?
	La patrino skribas leteron.	Kion faras la patrino? - La patrino skribas leteron. Kion skribas la patrino? - Ŝi skribas leteron.
	Pilko	Kio estas tio? - Tio estas pilko. Ĉu la pilko estas bela? Ĉu ĝi estas bona?

	La infano havas pilkon. Kio.n Pilk.o.n	Kion havas la infano? - La infano havas pilkon. Li havas ĝin.
	La pilko estas nigra-blanka.	Kia estas lia pilko? Lia pilko estas nigra-blanka.

Ekzercoj	تمرین ها
A. Respondu:	الف، پاسخ دهید:

- 1- Ĉu la kokidoj manĝas?
- 2- Ĉu la infano havas birdon?
- 3- Ĉu la gepatroj havas pilkon?
- 4- Ĉu la pilko estas nigra?
- 5- Kia estas la birdo?
- 6- Kia estas la pilko?
- 7- Kiaj estas la birdoj?
- 8- Kion faras la kokidoj?
- 9- Kion havas la infano?

B. Priskribu	ب. توصیف کنید:
	1-
	2-

C. Plenigu		ب. کامل کنید:	
	1- Du birdoj sur la arbo. Ili estas la arbo.		3- Tri kokidoj akvon. Ili trinkas
	2- Kio estas tio? - Tio estas Ĝi estas pilko.		4- La infano havas Li ĝin.

پاسخ تمرین‌ها

الف. پاسخ دهید

- 1- Ne, la kokidoj ne manĝas. La kokidoj trinkas.
- 2- Ne, la infano ne havas birdon. La infano havas pilkon.
- 3- Ne, la gepatroj ne havas pilkon. La infano havas pilkon.
- 4- Ne, la pilko ne estas nigra. La pilko estas nigra-blanka.
- 5- La birdo estas blanka.
- 6- La pilko estas nigra-blanka.
- 7- La birdoj estas blankaj.
- 8- La kokidoj trinkas akvon.
- 9- La infano havas pilkon.

ب. توصیف کنید


- 1- La patro sidas kaj legas. Li ne iras. Li ne venas. Li ne staras. La patro ne skribas. Li ne legas libron.
- 2- La patrino sidas kaj skribas. Ŝi skribas leteron. La patrino ne legas. Ŝi ne staras. Ŝi ne iras. Ŝi sidas.

پ. کامل کنید






- 1- Du birdoj **estas** sur la arbo. Ili estas **sur** la arbo.
- 2- Kio estas tio? Tio estas **pilko**. Ĝi estas **nigra-blanka** pilko.
- 3- Tri kokidoj **trinkas** akvon. Ili trinkas **akvon**.
- 4- La infano havas **pilkon**. Li **havas** ĝin.


درس هفتم: آشنایی با زمان‌های ساده‌ی فعل‌ها



7-a Leciono: Simplaj Verboj de Esperanto

	Telefono	Kio estas tio? - Tio estas telefono. Ĉu la telefono estas nigra-blanka? Ĉu ĝi nigras? <u>Nigras = estas nigra</u>
	Telefonejo <u>Telefon.ej.o</u>	Kio estas tio? Tio estas telefonejo. Ĉu la telefonejo estas malgranda?
	La patrino telefonas.	Kion faras la patrino? - La patrino telefonas.
	La patrino estas en la telefonejo.	Kie estas la patrino? - La patrino estas en la telefonejo. Kion faras la patrino? - Ŝi telefonas.
	La aŭtomobilo (= la aŭto)	Kio estas tio? - Tio estas aŭto. Kia estas la aŭto? - Ĝi estas blanka.
	La patro estas en la aŭto.	Kie estas la patro? - Li estas en la aŭto.

	La patro iras per la aŭto.	Kion faras la patro? - Li iras per la aŭto. Per kio iras la patro? - Per aŭtomobilo iras la patro.
	La patrino kuiras.	Kion faras la patrino? - La patrino kuiras. Ŝi kuiras. Ĉu ŝi trinkas?
	La patrino estas en la kuirejo. <u>Kuir.ej.o</u> <u>Telefon.ej.o</u>	Kie estas la patrino? Ŝi estas en la kuirejo. Ĉu ŝi estas en la telefonejo? Ne, ŝi estas en la kuirejo.
	La patrino kuiras en la kuirejo. Ŝi kuiras.	Kie kuiras la patrino? Ŝi kuiras en la kuirejo. Kion faras la patrino? - Ŝi kuiras.
	La patrino kuiras ovon. <u>Kio.n</u> <u>Ov.o.n</u>	Kion kuiras la patrino? - Ŝi kuiras la ovon. Ŝi kuiras ĝin.
	Seĝo	Kia estas la seĝo? - La seĝo estas blanka. Ĝi estas blanka = ĝi blankas. <u>Estas blanka = blankas</u>

	Nigra tablo	Kia estas la tablo? - La tablo estas nigra. Ĝi estas nigra = ĝi nigras. <u>Estas nigra = nigras</u>
	Blanka tablo	Ĉu la tablo nigras? - Ne, la tablo ne nigras. La tablo blankas. Ĝi blankas.
	Sep seĝoj estas ĉirkaŭ la tablo. Ĉirkaŭ: 	Kie estas la seĝoj? - Ili estas ĉirkaŭ la tablo. Kiaj estas la seĝoj? - La seĝoj estas blankaj. Ili blankas.
	La kokidoj estas ĉirkaŭ la kokino. La kokino grandas. La kokidoj malgrandas. <u>grand.as = estas granda</u> <u>Mal.grand.as</u>	Kie estas la kokidoj? - Ili estas ĉirkaŭ la kokino. Ĉu la kokino malgrandas? - Ne, ĝi ne malgrandas. Ĝi grandas.
	La familio sidas ĉirkaŭ la tablo.	Ĉu la gepatroj sidas ĉirkaŭ la tablo? Kie sidas la familio?
	La libro estas sur la tablo.	Kie estas la libro? Kio estas sur la tablo? Ĉu la libro estas sur la seĝo? Ĉu la libro estas sub la tablo?


	Li manĝas. Mang.as	Kion li faras? - Li manĝas. Far.as
	Li manĝis. Mang.is	Kion li faris? - Li manĝis. Far.is Ĉu li manĝas? - Ne, li ne manĝas. Li manĝis.
	Li manĝos. Mang.os	Kion li faros? - Li manĝos. Far.os Ĉu li manĝis? - Ne, li ne manĝis. Li manĝos.
	La patrino skribas leteron. Skrib.as	Ĉu la patrino skribis la leteron? - Ne, ŝi ne skribis la leteron. Ŝi skribas la leteron. Ĉu ŝi skribos la leteron? Kion ŝi faras?
	La patrino skribis leteron. Skrib.is	Kion faris la patrino? - Ŝi skribis la leteron. Kion skribis la patrino? Ĉu ŝi skribas la leteron? - Ne, ŝi ne skribas la leteron. Ŝi skribis la leteron.
	La patrino skribos leteron. Skrib.os	Ĉu la patrino skribas la leteron? - Ne, ŝi ne skribas la leteron. Ŝi skribos la leteron.

	La patrino skribas per skribilo. <u>Skrib.il.o</u> <u>Flug.il.o</u>	Per kio la patrino skribas? - Ĝi skribas per skribilo. Kion faras la patrino? Ĉu ĝi skribas per flugilo?
	Krajono La krajono estas skribilo.	Ĉu la krajono estas flugilo? Kio estas krajono?
	Glob-krajono <u>Glob.krajon.o</u> La globkrajono estas skribilo. La krajono kaj la globkrajono estas skribiloj.	<u>Kaj = + = &</u> Kio estas globkrajono? Kio estas krajono kaj globkrajono? - Ili estas skribiloj.

Ekzercoj	تمرین ها
A. Respondu:	الف. پاسخ دهید:

- 1- Per kio skribas la patrino?
- 2- Per kio iras la patro?
- 3- Ĉu la gepatroj manĝis?
- 4- Ĉu la infano skribos leteron?
- 5- Ĉu la gepatroj havos flugilojn?
- 6- Ĉu la skribilo estas granda?
- 7- Kie estas sep seĝoj?
- 8- Kia estas la tablo?
- 9- Kiaj estas la seĝoj?
- 10- kion faras la patrino?
- 11- Kion faris la patro?
- 12- Kion havas la patrino?

B. Priskribu	ب. توصیف کنید:
	1-
	2-

C. Plenigu		ب. کامل کنید:	
	1- La patro Li trinkas.		3- La patro Li trinkis
	2- Kio estas tio? - Tio estas Ĝi estas krajono.		4- La patrino ne estas en la Ŝi en la telefonejo.

پاسخ تمرین‌ها

الف. پاسخ دهید

- 1- La patrino skribas per krajono.
- 2- La patro iras per aŭto.
- 3- Jes, la gepatroj manĝis.
- 4- Ne la infano ne skribos leteron. La patrino skribos leteron.
- 5- Ne, la gepatroj ne havos flugilojn. La papilioj havas flugilojn.
- 6- Ne, la skribilo ne estas granda. Ĝi estas malgranda.
- 7- Sep seĝoj estas ĉirkaŭ la tablo.

- 8- La tablo estas granda kaj nigra.
- 9- La seĝoj estas malgrandaj kaj blankaj.
- 10- La patrino skribos lateron.
- 11- La patro legis libron.
- 12- La patrino havas krajonon.

ب. توصیف کنید


- 1- La patro sidas kaj ne manĝas. Li ne trinkas. Li ne staras. Li ne manĝis. La patro ne manĝas. Li manĝos.
- 2- La patrino sidas kaj skribas leteron. Ŝi ne skribis leteron. La patrino ne skribos. Ŝi skribas leteron.



پ. کامل کنید





- 1- La patro **manĝas**. Li **ne** trinkas.
- 2- Kio estas tio? Tio estas **krajono**. Ĝi estas **malgranda** krajono.
- 3- La patro **ne manĝas**. Li trinkis **akvon**.
- 4- La patrino ne estas en la **telefonejo**. Ŝi **estis** en la telefonejo.



درس هشتم: آشنایی با ضمایر و فعل امری




8-a Leciono: Esperantaj Pronomoj kaj Imperativo

	La infano: “Mi” Li diras: “Mi estas malgranda.”	Kion diras la infano? - Li diras: “Mi estas malgranda.”
	La patro al infano: “Vi” La patro diras al infano: “Vi estas mia infano”. <u>mi.a</u>	Kion diras la patro? Li diras: “Vi estas mia infano”.
	La infano diras al la patrino: “Vi estas mia patrino kaj mi estas via infano”. <u>vi.a</u>	Kion li diras al ŝi? Li diras: “Vi estas mia patrino kaj mi estas via infano”.
	La infano diras al la patro: “Vi estas mia patro! Vi estas granda!”. <u>Li.a</u>	La patro kaj lia infano.
	“Vi venu al mi!” = “Venu al mi!” <u>ven.u</u> Vi venu = Venu	Kion diras la patro al la infano?
	La patrino diras: “Venu al mi, mia infano!”. <u>Ŝi.a</u>	La patrino kaj ŝia infano

	La patrino diras: “Manĝu, mia infano!”. Manĝ.u Ven.u	Kion ŝi diras? Ĉu ŝi diras tion al la patro?
	Manĝaĵo Manĝ.aj.o Pomo estas manĝaĵo. Piro estas manĝaĵo.	Ĉu akvo estas manĝaĵo? - Ne, akvo ne estas manĝaĵo. Piro estas manĝaĵo.
	Trinkaĵo Trink.aj.o	Ĉu pomo estas trinkaĵo? - Ne, pomo ne estas trinkaĵo. Akvo estas trinkaĵo. Pomo estas manĝaĵo.
	La infano manĝas la manĝaĵon.	Kion faras la infano? Kion manĝas la infano? Ĉu la infano trinkas?
	Akvo estas trinkaĵo.	Ĉu akvo estas bona trinkaĵo?
	La glaso	Ĉu la glaso estas manĝaĵo? Ĉu la glaso estas trinkaĵo? - Ne, la glaso ne estas trinkaĵo. Akvo esas trinkaĵo.
	Plena glaso En la glaso estas akvo.	Ĉu la glaso plenas? - Jes, la glaso estas plena. Kio estas en la glaso?

	Malplena glaso En la glaso ne estas akvo. <u>Mal.plen.a</u>	Ĉu la glaso plenas? Ĉu akvo estas en la glaso? Ĉu trinkaĵo estas en la glaso.
	Neplena glaso <u>Ne.plen.a</u> La neplena glaso ne estas malplena.	Kia estas la glaso? Ĉu la glaso estas plena? Ĉu la glaso malplenas? Ĉu akvo estas trinkaĵo? Ĉu trinkaĵo estas en la glaso?
	La infano trinkis akvon. La glaso malplenas. <u>Mal.plen.as</u> <u>Mal.plen.a</u>	Kion faris la infano? Kia estas la glaso? Kion trinkis la infano? Ĉu la infano trinkas akvon?
	La glaso estas akvo-plena. Li havas akvo-plenan glason. <u>Akvo-plenan</u> <u>Akv.o.plen.a.n</u>	Kion faros la infano? Kia estas la glaso?
	La telefonejo estas malplena. Ĝi malplenas.	Ĉu la patro estas en la telefonejo? Ĉu la patrino estas en la telefonejo?
	Bona pomo Bona pomo estas manĝebla. <u>Manĝ.ebl.a</u>	Kia estas la pomo? Ĉu ĝi estas bona? Ĉu la pomo estas manĝebla?
	Malbona pomo Malbona pomo ne estas manĝebla. <u>Mal.bon.a</u>	Ĉu la pomo estas bona? Kia estas la pomo? - Ĝi estas nemanĝebla. <u>Ne.manĝ.ebl.a</u>


	Bona aŭto	Ĉu ĝi estas malbona aŭto?
	Malbona aŭto	Ĉu ĝi estas malbona aŭto? - Jes, ĝi estas malbona aŭto. Ĝi estis bona aŭto.
	“Vi estas bona infano”.	Kion diras la patro? Ĉu la infano estas malbona? Ĉu la infano estas bona? Kia estas la infano?
	La infano diras: “Akvo estas bona trinkaĵo”. La akvo estas trinkebla. <u>Trink.ebl.a</u>	Kion diras la infano? Ĉu akvo estas bona trinkaĵo? Ĉu ĝi trinkeblas? <u>Estas trinkebla = trinkeblas</u>
	La infano al la amiko: “Saluton!” La amiko al la infano: “Saluton!” Ili salutas.	Kion diras la infano? Ĉu li salutas? Kion faras la amiko?
	La amiko de la infano	Ĉu li estas la amiko de la infano? - Jes, li estas la amiko de la infano.

	Sinjoro (s-ro) Piŝro estas la amiko de la patro. <u>Sinjoro = s-ro</u>	Kiu estas li? - Li estas sinjoro Piŝro. <u>Kiu</u>
	Sinjinino (S-ino) Piŝro estas la amikino de la patrino. <u>Sinjin.in.o = s-ino</u> Gesinjinoroj Piŝro estas geamikoj de la gepatroj.	Kiu estas ŝi? - Ŝi estas sinjinino Piŝro. <u>Ge.sinjinor.oj</u> <u>Ge.amik.o.j</u> <u>Ge.patr.o.j</u>
	La hundo estas malamiko de la kato.	Ĉu la hundo estas amiko de la kato? - Ne, ĝi ne estas amiko de la kato. Ĝi estas malamiko de la kato.
	Ok <u>8=ok</u> Kvar kaj kvar estas ok. (4+4=8)	Ĉu kvin kaj du estas ok? - Ne, 5 kaj 2 ne estas ok. Kvin kaj du estas sep.
	La kato estas la malamiko de la kokidoj.	Ĉu la kato estas la malamiko de la infano? - Ne, ĝi ne estas la malamiko de la infano. Ĝi estas la malamiko de la kokidoj.
	La infano kuras.	Kiu kuras? La infano kuras. Kion li faras? Ĉu li manĝas? Al kio li kuras? Post kio li kuras? (- Post kato)

	La hundo kuras post la kato.	Kio kuras? - La hundo kuras. Post kio kuras la hundo? - Post la kato kuras la hundo.
Mi + Mi = Ni Vi + Vi = Vi Li + Li = Ili Ŝi + Ŝi = Ili Ĝi + Ĝi = Ili	Mi estas amiko de vi. Hundo estas malamiko de kato. Kato estas malamiko de kokidoj.	Ĉu vi estas amiko de la katoj? Ĉu ŝi kuras post la kato? Ĉu ili iras al la arbo? Ĉu ni trinkis akvon? Kiu estas via amiko?
Mi → Mia Vi → Via Li → Lia Ŝi → Ŝia Ĝi → Ĝia Ili → Ilia	Mi estas via amiko. Ni estas viaj amikoj. Li estas mia amiko. Ŝi estas ŝia amikino. Ili estas miaj amikoj. Ĝi estas ĝia malamiko.	Via amiko Viaj amikoj Mia amiko Miaj amikoj

Ekzercoj	تمرین ها
A. Respondu:	الف. پاسخ دهید:

- 1- Ĉu la patro havas amikon?
- 2- Ĉu la patrino trinkas bonan trinkaĵon?
- 3- Ĉu akvo estas malbona trinkaĵo?
- 4- Ĉu la pomo estas trinkaĵo?
- 5- Ĉu la kato kuras post hundo?
- 6- Ĉu vi estas patro?
- 7- Ĉu mi estas patrino?
- 8- Ĉu vi havas infanon?
- 9- Ĉu vi havas bonajn amikojn?
- 10- Kiu estas via amiko?
- 11- Post kio kuras la hundo?
- 12- Kato estas malamiko de kio?
- 13- Kato kuras post kio?
- 14- Kiu estas la amiko de sinjoro Piŝro?

B. Priskribu	ب. توصیف کنید:
	1-
	2-

C. Plenigu	ب. کامل کنید:
	1- S-ro Piŝro la amiko de la patro. Ili estas
	2- La kato estas malamiko de la Ĝi estas de kokidoj.
	3- La pomo estas Ĝi ne estas
	4- La patro..... al la infano: “ estas infano”.

پاسخ تمرین‌ها

الف. پاسخ دهید

- 1- Jes, la patro havas amikon.
- 2- Jes, la patrino trinkas bonan trinkaĵon.
- 3- Ne, akvo ne estas malbona trinkaĵo. Ĝi estas bona trinkaĵo.
- 4- Ne la pomo ne estas trinkaĵo. Akvo estas trinkaĵo.
- 5- Ne, la kato ne kuras post la hundo. La hundo kuras post la kato.
- 6- Jes, mi estas patro./Ne, mi ne estas patro.
- 7- Jes, vi estas patrino./Ne, vi ne estas patrino.
- 8- Jes, mi havas infanon./Ne, mi ne havas infanon.

- 9- Jes, mi havas bonajn amikojn.
- 10- Mia patro estas mia amiko.
- 11- La hundo kuras post kato.
- 12- Kato estas malamiko de hundo.
- 13- Kato kuras post kokidoj.
- 14- La patro estas la amiko de sinjoro Piŝro.

ب. توصیف کنید

- 1- La kato sidas sur la arbo. Ĝi ne staras. Ĝi ne iras. Ĝi ne kuras. La kato sidas.
- 2- La patrino flaras floron. Ŝi ne manĝas floron. Ŝi ne trinkas floron. Ŝi flaras ĝin.



پ. کامل کنید




- 1- S-ro Piŝro **estas** la amiko de la patro. Ili estas **amikoj**.
- 2- La kato estas malamiko de la **kokidoj**.
- 3- La pomo estas **malbona**. Ĝi ne estas **bona**.
- 4- La patro **diras** al la infano: “**Vi** estas **mia** infano.

درس نهم: آشنایی با ضمائر مفعولی و انعکاسی

9-a Leciono: Akuzativaj Pronomoj de Esperanto

	Spegulo	Kio estas tio? - Tio estas spegulo. Ĉu la spegulo estas granda? Kia estas la spergulo?
	Okuloj	Kio estas tio? - Tio estas okuloj. Ĉu la okuloj estas nigraj?
	La infano vidas. Li vidas per la okuloj. Li vidas la floron. Li vidas ĝin per la okuloj.	Kiu vidas? - La infano vidas. Kion la infano vidas? Kiu vidas la floron? Per kio vidas la infano? Ĉu la infano flaras per la nazo?
	La infano vidas la pomarbon. Li vidas ĝin. Ĝi.n	Kion vidas la infano? Ĉu la infano vidas pirarbon? Ĉu li vidas altan arbon? Ĉu vi vidis malaltan arbon. Per kio li vidas?
	La infano vidas la patrinon. Li vidas ŝin. Ŝi.n	Ĉu la patrino vidas lin. - Ne, ŝi ne vidas lin. Ŝi vidas nin.
	La infano vidas sin en la spegulo. Li vidas sin. Si.n	Kiu vidas sin en la spegulo? Ĉu li vidas lin en la spegulo? - Ne, li ne vidas lin en la spegulo. Li vidas sin en la spegulo.

	La patro vidas infanon. Li vidas lin. Li.n	Kiu vidas lin? Kiun li vidas. Kiu lin vidas? Per kio li vidas lin?
	La infano vidas la amikon. Li vidas lin.	Kiun vidas la infano? Ĉu la infano vidas ŝin? Ĉu la infano vidas lin? Kiun li vidas?
	La patrino vidas sin en la spegulo. Ŝi vidas sin. Ŝi vidas sin en ĝi.	Kion faras la patrino? Ĉu ŝi vidas lin en la spegulo? - Ne, ŝi vidas sin en la spegulo.
	La infano flaras per sia nazo. Sia	Kiu flaras? Per kio li flaras? Ĉu li flaras per lia nazo? - Ne, li flaras per sia nazo.
	La infano vidas per siaj okuloj. Sia.j Sia.j okul.o.j	Per kio la infano vidas? Ĉu la infano vidas per sia nazo?
	La patro venas kun sia amiko.	Kiuj venas? - La patro kaj lia amiko venas. Ĉu la patro venas kun lia amiko? - Ne, la patro venas kun sia amiko. Ĉu ili iras?

	La patrino iras kun sia amikino.	Ĉu ŝi iras kun ŝia amikino? - Ne, ŝi iras kun sia amikino.
	Printempo La printempo estas sezono. Ĝi estas la unua sezono de la jaro en Irano. Unu.a = 1-a	Rozo estas floro. Ĉu en printempo ni vidas florojn?
	Somero La somero estas la dua sezono de la jaro en Irano. Du.a = 2-a	Piro kaj pomo estas fruktoj. Ĉu en somero ni vidas fruktojn sur la arboj?
	Aŭtuno Ĝi estas la tria sezono en Irano. Tri.a = 3-a	Ĉu en aŭtuno ni vidas florojn?
	Vintro Ĝi estas la kvara sezono en Irano. Kvar.a = 4-a	Ĉu en vintro ni vidas fruktojn sur la arboj?
La printempo, la somero, la aŭtuno, kaj la vintro estas kvar sezonoj de la jaro.	La jaro havas dek du monatojn. La sezonoj en Irano havas tri monatojn.	9 Naŭ 10 Dek 11 Dek unu 11 Dek du

Ekzercoj	تمرین‌ها
A. Respondu:	الف. پاسخ دهید:

1. Ĉu la jaro havas dek du monatojn?
2. Ĉu la infano vidas per sia nazo?
3. Ĉu la patrino havas tri okulojn?
4. Ĉu vi vidas per viaj oreloj?
5. Ĉu ŝi vidas sin en la spegulo, aŭ ŝin?
6. Ĉu la printempo estas la tria sezono en Irano?
7. Kio estas la dek unua monato en Irano?
8. Ĉu Ĥordad-monato estas la dua monato de vintro?
9. Kun kiu venas la patro?
10. Kun kiu iras la patrino?
11. Per kio la infano vidas?
12. Per kio la patrino flaras?

B. Traduku:	ب. ترجمه کنید:
-------------	----------------

1. بچه با لیوان آب می‌خورد.
2. آقای امیدوار خود را در آینه می‌بیند.
3. آینه و سیب‌ها روی میز است.
4. پدر، مادر و بچه با ماشین می‌آیند.
5. بچه همراه با تویی به دنبال سگی می‌دود.
6. پاییز دومین فصل سال در ایران و فصلی زیبا است.

پاسخ تمرین‌ها

الف. پاسخ دهید

1. Jes, la jaro havas dek du monatojn.
2. Ne, la infano ne vidas per sia nazo. Li vidas per siaj okuloj.
3. Ne, la patrino ne havas tri okulojn. La patrino havas du okulojn.
4. Ne, mi ne vidas per miaj oreloj. Mi vidas per miaj okuloj.
5. Ŝi vidas sin en la spegulo.
6. Ne la printempo ne estas la tria sezono en Irano. Ĝi estas la unua sezono.
7. Bahmano estas la dek unua monato en Irano.
8. Ne, Ĥordad-monato ne estas la dua monato de vintro. Ĝi estas la tria monato de printempo.
9. Kun sinjoro Piŝro venas la patro.
10. Kun sinjorino Piŝro iras la patrino.

11. Per la okuloj vidas la infano.

12. Per la nazo flaras la patrino.

ب. ترجمه کنید

1. La infano drinkas akvon per la glaso.

2. Sinjoro Omidvar vidas sin en la spegulo.

3. La spegulo kaj la pomoj estas sur la tablo.



4. La patro, la patrino kaj la infano venas per la aŭto.



5. La infano kun pilko kuras post hundo.

6. La aŭtuno estas la tria sezono de la jaro en Irano, kaj estas bela sezono.

درس دهم: آشنایی با قیدها

10-a Leciono: Esperantaj Adverboj

	Bela Li estas bela. La floro estas bela. Li estas bela, ankaŭ la floro estas bela.	Ĉu la rozo estas bela? Kia estas la rozo?
	Malbela Li estas malbela. Li ne estas bela. <u>Mal.bel.a</u>	Ĉu la floro estas malbela? Ĉu li estas bela? Ĉu la papilio estas bela?
	La bela floro kaj la nebela floro. <u>Ne.bel.a</u>	Ĉu la rozo estas malbela floro? Ĉu vi flaras belajn florojn? Ĉu ekzistas malbela aŭ nebela floro? <u>Ekzistas = estas</u>
	La seĝo, tablo, spegulo kaj krajono estas objektoj. Ankaŭ la glaso kaj la pilko estas objektoj.	Ĉu seĝoj estas objektoj? Ĉu la globkrajono estas objekto? Ĉu vi havas objektojn? Ĉu ankaŭ libro estas objekto?
	La koko, kokino, kato kaj hundo estas bestoj. Ankaŭ la kokido kaj la papilio estas bestoj.	Ĉu hundo estas bona besto? Ĉu vi havas beston? Ĉu la hundido estas ido de la hundo? Ĉu la katido estas bela besto? Ĉu papilio estas granda besto?
	La infano, patro kaj patrino estas homoj. Ankaŭ gesinjoroj Piŝro estas homoj.	Ĉu la birdo estas homo? Ĉu la kato estas homo? Ĉu la infano estas objekto? Ĉu la homoj manĝas kaj trinkas? Ĉu la homoj legas libron?

	La floroj, pomarbo kaj pirarbo estas plantoj. Ankaŭ la rozo estas planto.	Ĉu la koko estas planto? Ĉu la floroj estas objektoj? Ĉu vi havas plantojn?
	Li skribas bele. <u>Bel.a</u> <u>Bel.e</u>	Ĉu li skribas bele? - Jes, li skribas bele. Ĉu vi skribas bele vian leteron? Ĉu vi skribas bele per kraĵono?
	Li skribas malbele. <u>Mal.bel.a</u> <u>Mal.bel.e</u>	Ĉu li skribas bele? Ĉu vi skribas bele viajn leterojn? Ĉu malbela letero estas bona? Ĉu vi skribas malbele per via globkraĵono?
	La hundo bone flaras. <u>Bon.a</u> <u>Bon.e</u>	Ĉu ankaŭ la katoj bone flaras? Per kio flaras la hundo? Ĉu la katoj flaras per siaj nazoj?
	Ŝtelisto La ŝtelisto estas malbona homo. <u>Ŝtel.ist.o</u>	Kia estas ŝtelisto? Kion faras la ŝtelisto? - La ŝtelisto ŝtelas. Ĉu li ŝtelos? Ĉu li ŝtelis? Ĉu li ŝtelas objektojn aŭ plantojn?
	Panisto La panisto estas bona homo. <u>Pan.ist.o</u>	Ĉu la pano estas bona manĝaĵo? Ĉu la panistoj bone faras panon? Ĉu vi manĝis panon? Ĉu vi havos panon? Ĉu la hundoj kaj la katoj manĝas panon?

	Instruisto Li instruas en la klaso. La instruisto instruas. <u>Instru.ist.o</u>	Ĉu vi estas instruisto? Ĉu vi estas instruistino? Ĉu via patro estis instruisto? Kion faras la instruistoj? - Ili instruas. Ĉu via patrino instruas fizikon? - Ne, ŝi instruas Esperanton.
	Lernanto Li lernas en la klaso. La klasoj estas en la lernejo. <u>Lern.ant.o</u> <u>Lern.ej.o</u>	Kie lernas la lernantoj? Ĉu la infano estas instruisto aŭ lernanto? Ĉu li lernas aŭ instruas? Ĉu vi estas sinjoro aŭ sinjorino?

Ekzercoj	تمرین‌ها
A. Respondu:	الف. پاسخ دهید:

1. Ĉu la gepatroj estas plantoj?
2. Ĉu la rozo estas bela homo?
3. Ĉu la libro estas bona amiko?
4. Ĉu vi havas kaj legas bonajn esperantajn librojn.
5. Kie lernas la gelernantoj?
6. Kie instruas la geinstruistoj?
7. Kiuj instruas en la lernejo?
8. Kiuj lernas en la lernejo?
9. Ĉu la lernantoj skribas bele kaj bone?
10. Ĉu la kokino kantas bele?
11. Ĉu la panistoj instruas aŭ faras panon?

B. Traduku:	ب. ترجمه کنید:
-------------	----------------

1. رز گلی زیباست.
2. کتاب دوست خوبی است.
3. معلم‌ها به شاگردان درس می‌دهند.
4. کتاب‌های شاگردان روی میزها است.
5. گل‌ها روی میز معلم است.

پاسخ تمرین‌ها

الف. پاسخ دهید



1. Ne, la gepatroj ne estas plantoj. Ili estas homoj.
2. Ne, la rozo ne estas bela homo. Ĝi estas bela planto kaj floro.
3. Jes, la libro estas bona amiko.
4. Jes, mi havas kaj legas bonajn esperantajn librojn.
5. La gelernantoj lernas en la lernejo.
6. En la lernejo la geinstruistoj instruas.
7. La geinstruistoj instruas en la lernejo.
8. La lernantoj lernas en la lernejo.
9. Jes, la lernantoj skribas bele kaj bone.
10. Ne, la kokino ne kantas bele. La koko kantas bele.
11. La panistoj faras panon.



ب. ترجمه کنید

1. La rozo estas bela floro.
2. La libro estas bona amiko.
3. La instruistoj instruas al la lernantoj.
4. La libroj de la lernantoj estas sur la tabloj.
5. la floroj estas sur la tablo de la instruisto.

درس يازدهم: آشنایی با افعال گذرا و ناگذرا

11-a Leciono: Esperantaj Verboj (transiraj kaj netransiraj)


	La radio-aparato (= radio) kaj televidilo <u>Tele.vid.il.o</u>	Ĉu vi havas televidilon? Ĉu via televidilo estas nigra-blanka aŭ kolora? Ĉu via radio funkcias per elektro aŭ per baterio?
	Fotilo kaj filmilo Per la fotilo fotisto faras foton kaj per la filmilo (= kamero) filmisto faras filmon. <u>Fot.il.o</u> <u>Film.il.o</u>	Ĉu la homoj fotas? Ĉu vi havas bonan fotilon aŭ filmilon? Ĉu via patro estas fotisto aŭ filmisto? Kio estas via telefon-numero? - Mia telefonnumero estas 3238950.
	Komputilo kaj kalkulilo La komputiloj kaj kalkuliloj estas modernaj maŝinoj. <u>Komput.il.o</u> <u>Kalkul.il.o</u>	Ĉu vi havas komputilon? Ĉu vi vidis komputilon? Kion faras la komputiloj? - Ili komputas. Ĉu via kalkulilo bone funkcias per baterio? Ĉu via patro estas komputilisto?
	Skribmaŝino (= tajpilo), lampo, kaj la papero en la tajpilo. <u>Skrib.maŝin.o</u> <u>Tajp.il.o</u>	Ĉu via skribmaŝino estas elektra? Ĉu via lampo funkcias? Ĉu vi skribas sur grandaj paperoj?
	Malpuraj manoj. Li lavas siajn manojn per akvo kaj sapo.	Ĉu liaj manoj estis puraj? Kion li faras? Ĉu li lavas la malpurajn manojn de la kato? Ĉu vi lavas viajn manojn per akvo kaj sapo? Ĉu vi lavas vin per ŝampuo? Ĉu vi havas duŝilon?

	Malpuraj manoj. La manoj de la infano estas malpuraj. <u>Mal.pur.a</u> <u>Mal.pur.a.j man.o.j</u>	Ĉu la manoj estas puraj? Ĉu la manoj estas malpuraj?
	La infano lavis siajn manojn per la akvo kaj sapo. La akvo kaj sapo purigis la manojn. Nun la manoj puriĝis. <u>Pur.ig.i</u> <u>Pur.iĝ.i</u>	Kiu purigis la manojn? - La infano purigis ilin. Kio puriĝis per la akvo kaj sapo? - La malpuraj manoj puriĝis per ili. Ĉu nun la manoj puras? - Jes nun la manoj estas puraj.
	Infano manĝas, pomo manĝiĝas, patrino manĝigas.	Ĉu la patrino manĝigas pomon al sia infano? Ĉu la pomo manĝiĝas per la infano? Kiu manĝas? Kiu manĝigas? Kio manĝiĝas?
	La infano trinkigas akvon al la kokido. <u>Trink.ig.as</u>	Kiu trinkigas la akvon al la kokido? Kio trinkas la akvon per la mano de la infano? Per kio trinkiĝas la akvo?
	La infano trinkis akvon. La akvo trinkiĝis. <u>Trink.iĝ.is</u>	Ĉu la akvo trinkiĝas per la infano? Kiu trinkis? Kio trinkiĝis?
	Infano trinkigas akvon, akvo trinkiĝas kaj la kokido trinkas.	Ĉu la infano trinkas? Ĉu la infano trinkigas? Kion li trinkigas? Al kio li trinkigas la akvon?

	Li manĝas la pomon. La pomo manĝiĝas. <u>Manĝ.iĝ.as</u>	Ĉu li manĝas? - Jes, li manĝas. Ĉu li manĝiĝas? - Ne, li ne manĝiĝas. La pomo manĝiĝas. Ĉu la pomo manĝas?
	La patrino manĝigas la manĝaĵon al la infano. <u>Manĝ.ig.as</u> Ŝi manĝigas, li manĝas kaj ĝi manĝiĝas.	Ĉu la patrino manĝigas manĝaĵon al sia infano? Ĉu la manĝaĵo manĝiĝas per la infano? Kiu manĝas? Kiu manĝigas? Kio manĝiĝas?

Ekzercoj	تمرین ها
A. Respondu:	الف. پاسخ دهید:

- Ĉu vi havas malgrandan kalkulilon?
- Kian komputilon havas via patrino?
- Kio estas la moderna maŝino?
- Ĉu komputilo estas homo aŭ objekto?
- Ĉu vi vidis baterian kolor-televidilon?
- Ĉu modernaj filmiloj filmas kolore, aŭ nigra-blanke?
- Ĉu via fotilo fotas nigra-blankan foton, aŭ koloran foton?
- Kiu havas kolor-filmilon?
- Ĉu nun ekzistas nigra-blanka filmilo?
- Ĉu filmilo estas bona aŭ televidilo?

B. Priskribu:	ب. توصيف كنيد:
	1-
	2-

B. Plenigu:		ب. كامل كنيد:	
	1- La infano la malpurajn manojn Liaj manoj		3- Ĉu viaj radio kaj televidilo funkcias per? Ili per elektro.
	2- La homoj fotas per kaj filmas per Ili kaj filmas sin.		4- Li la pomon kaj la pomo La pomo manĝebla.

پاسخ تمرین‌ها

الف. پاسخ دهید

1. Jes, mi havas malgrandan kalkulilon.
2. Mia patrino havas bonan komputilon.
3. Komputilo estas moderna maŝino.
4. Komputilo estas objekto.
5. Jes, mi vidis baterian kolor-televidilon.
6. Modernaj filmiloj kolore filmas.
7. Mia fotilo fotas nigra-blankan kaj koloran foton.
8. Mia amiko kaj mia instruisto havas kolor-filmilojn.
9. Ne, nun ne ekzistas nigra-blanka filmilo.
10. Filmilo kaj televidilo estas bonaj. (Kaj filmilo kaj televidilo estas bonaj.)

ب. توصیف کنید

1. La patrino manĝigas la manĝaĵon al la infano. Ŝi manĝigas, li manĝas, kaj la manĝaĵo manĝiĝas.
2. La infano trinkigas akvon al la kokido. Li trinkigas, ĝi trinkas, kaj akvo trinkiĝas.

پ. کامل کنید

1. La infano **lavas** la malpurajn manojn. Liaj manoj **puriĝas**.
2. La homoj fotas per **fotilo** kaj filmas per **filmilo**. Ili **fotas** kaj filmas sin.
3. Ĉu viaj radio kaj televidilo funkcias per **elektro**? Ili **funkcias** per elektro.
4. Li **manĝas** la pomon kaj la pomo **manĝiĝas**. La pomo **estas** manĝebla.

2- سطح متوسطه

2- La Meza Nivel

درس دوازدهم: در باره‌ی نوشیدنی‌ها	
12-a Leciono: Kion Ni Trinku?	
	
Plej.multo de nia korpo estas akvo. Kion ni trinku? ¹	

Ĉirkaŭ du tri.onoj de nia korpo estas akvo. Do nia korpo forte bezonas al trink.aĵoj por resti sama kaj sana. Sed kion ni trinku, kaj kiom? Ekzistas tre diversaj opinioj, tamen ĉi tie ni diras la plej komune akcept.itajn ideojn pri trink.ado.

Sen.dube la akvo estas tre taŭga por trink.ado. Ĝi ĉiam ekzistis en la naturo dum la homa historio kaj eĉ la pra.homoj povis plej facile akiri ĝin por sen.soif.igi sin.

La alia natura trink.aĵo estas la lakto. Ĝi estas kaj bon.gusta trink.aĵo, kaj bona nutr.aĵo. La lakto plenas de proteinoj, kiujn forte bezonas nia korpo. Ĝi estas ankaŭ riĉa je kalcio. Nia korpo bezonas kalcion por sia kresk.ado, precipe por la form.iĝo kaj firm.iĝo de la ostoj. Multaj kredas ke ni bezon.egas lakton ne nur dum nia infan.aĝo kaj jun.aĝo, t.e. (tio estas) kresk.aĝo, sed ankaŭ dum la mal.jun.aĝo.

Akir.ado kaj konserv.ado de lakto ne estis - kaj eĉ ankoraŭ ne estas - tiel facile, kiel estas pri la akvo. Unue, ne ĉies lakto estas taŭga por homa trink.ado; due la lakto estas tre nutra ne nur por ni, sed ankaŭ por mikroboj. Do ĝi estas tre facile kaj rapide putr.ema likv.aĵo. Ĝuste kontraŭ tiaj poluci.iĝoj oni pasteŭr.izas ĝin. Lakton oni devas konservi en relative mal.altaj temperaturoj. La putr.inta lakto povas venen.igi la korpon severe.

Teo kaj kafo havas utilajn elementojn, tamen ili ankaŭ en.havas narkot.aĵojn. La teo en.havas teinon kaj la kafo en.havas kafeinon. Do oni neniel devas tro.igi en ilia trink.ado. Ili ne nur ne donas akvon al nia korpo, sed ankaŭ mal.pli.igas la akvon de la korpo.

¹ fotoj de interreto.

کلمه‌ها و ترکیب‌های تازه **Novaj vortoj kaj kun.metoj**

سن کودکی، طفولیت **infan.aĝo** سن جوانی، شباب **jun.aĝo** سن پذیرفته شده، مقبول **akcept.ita** قبولانیدن **akcept.igi** پذیرفتن **akcepti**
 به‌دست‌آمده **akir.ita** دست‌آورد **akir.aĵo** به‌دست‌آوردن **akiri**
 لازم گشتن **bezoniĝi** احتیاجات، مایحتاج **bezoni.aĵoj** احتیاج داشتن **bezoni**
 سفت کردن **firm.igi** سفت شدن **firm.iĝi** سفت **firma**
 بشریت، کل انسان‌ها **hom.aro** انسان‌های اولیه **pra.homoj** انسان، بشر **homo**
 (محلول) دم‌کرده **infuz.aĵo** دم‌کرده (شده) **infuz.ita** دم کردن **infuzi**
 سرشار از کافئین **kafein.rîĉa** بدون کافئین **sen.kafeina** کافئین **kafeino**
 جعبه‌ی قهوه **kaf.skatolo** شیرقهوه **lakt.o.kafo** قهوه **kafo**
 سرشار از کلسیم **kalci.o.rîĉa** کلسیمی، کلسیم‌دار **kalcia** کلسیم **kalcio**
 محافظت از **mem.konservo** کنسرو (ماهی، ...) **konserv.aĵo** حفظ کردن، محافظت کردن **konservi**
 خود
 رستنی **kresk.aĵo** درحال رشد، رویان **kresk.anta** رشد کردن **kreski**
 شیرفروشی **lakt.ejo** شیرفروش **lakt.isto** شیر **lakto**
 مایع کردن **likv.igi** مایع **likv.aĵo** مایع **likva**
 اعتیاد به مواد مخدر **narkot.ismo** مواد مخدر **narkot.aĵoj** مخدر **narkota**
 مغذی **nutra** غذا **nutr.aĵo** تغذیه کردن **nutri**
 استخوان کوچک **ost.eto** استخوانی **osta** استخوان **osto**
 انستیتو **Pasteŭr.instituto** پاستوریزه کردن **pasteŭr.izi** پاستور (زیست‌شناس فرانسوی) **Pasteŭro**
 پاستور
 کمتر کردن، کاستن **mal.pli.igi** بیشتر کردن، ازدیاد بخشیدن **pli.igi** بیشتر، -تر **pli**
 آلوده‌کننده **polucia** آلوده کردن **policii** آلودگی **polucio**
 بدون پروتئین **sen.proteina** پروتئینی **proteina** پروتئین **proteino**
 فاسد کردن **putr.igi** فاسدشدنی **putr.ema** فاسدشدن **putri**
 رفع تشنگی کردن از **sen.soif.igi** تشنه بودن **soifi** تشنه **soifa**
 پُر از تئین **tein.plena** بدون تئین **sen.teina** تئین **teino**
 قوری چای **te.kruĉo** فنجان چای **te.taso** چای **teo**
 سه‌برابر (سویل) **tri.oble** دو (تا یک) سوم **tri.onoj** سه **tri**
 مسموم شدن **venen.iĝi** مسموم کردن **venen.igi** سم، زهر **veneno**

Ekzercoj

A- Plenigu:

1. Akvo estas la plej trinkaĵo.
2. La plej ĉefaj trinkaĵoj estas:,, kaj
3. Oni ne devas troigi en trinkado de kaj ĉar ili estas narkotaj.
4. La plej putrema trinkaĵo estas
5. La plej natura kaj nutra trinkaĵo estas

Respondu:

1. Kio estas la plej malnova trinkaĵo de la homo?
2. Kiuj trinkaĵoj enhavas narkotaĵon?
3. Kiu trinkaĵo enhavas teinon?
4. Kiu trinkaĵo enhavas kafeinon?
5. Kiom da nia korpo konsistas el akvo?
6. Kion oni faras kontraŭ putro de la lakto?

Skribu:


1. Kiujn trinkaĵojn vi pli ŝatas? Kial?
2. Komparu bonajn kaj malbonajn efikojn de ĉiu trinkaĵo.
3. Kiel ni povas kompreni ĉu la lakto estas sana aŭ ne?
4. Kiel vi infuzas la teon?
5. Kio estis Pasteŭro? El kiu lando?

Diskutu:

1. Kiu trinkaĵo estas pli sensoifiga?
2. Kial lakto estas putrema?
3. Ĉu ni povas vivteni nin nur per likvaĵoj?
4. Ĉu akvoterapio (hidroterapio) estas efika?
5. Kion faras Pasteŭr-institutoj?

درس سیزدهم: رادیوهای اسپرانتو

13-a Leciono: Radioj en Esperanto



Esper.anto estas tre riĉa radie: nur tiu ĉi inter.reta arkivo havas 1440 Esper.antajn program.erojn (en Novembro de 2004).

Por ĉiu viv.anta lingvo certaj komunik.iloj estas bezon.ataj, ekz-e alfabeto, korespond.ado, gazet.aro, radio kaj tele.vido. La du lastaj havas eĉ pli gravan rolon ĉar ili aŭd.igas ankaŭ la pronanc.manieron de la lingvo, kaj tiel povas unu.ec.igi ĝin tra la mondo. Por Esper.anto ĉiuj ĉi rimedoj estas eĉ pli bezon.ataj, ĉar Esperantistoj loĝas tre dise tra la tuta mondo kaj mal.pli ol ali.lingv.anoj havas la okazon ĝui ĉe.estan inter.komunikon.

Radiaj programoj en Esper.anto komenc.iĝis en la jaro 1922. En tiu jaro Usono kaj Anglio komencis la unuajn radiajn el.sendojn. En la posta jaro ankaŭ en Moskvo ekis Esper.antaj radio.programoj. Poste Montrealo kaj Rio-de-ĵanejro komencis tiajn el.sendojn. En la jaro 1924 jam el.send.iĝis Esper.antaj radio.programoj el Prago (ek.de la 31-a de Januaro), Ĝenevo (ek.de la 18-a de Marto), Helsinkio (ek.de la 6-a de Aprilo) kaj Parizo (ek.de la 7-a de Aprilo).

En 1933 entute 83 radio.stacioj el 14 landoj el.sendis 1774 program.erojn en aŭ pri Esper.anto. Tamen, kiam la dua mond.milito komenc.iĝis tiaj el.sendoj mal.pli.iĝis. Post la milito, jam en 1945, ok radio.stacioj el sep landoj re.komencis siajn Esper.antajn programojn. Postan jaron, jam funkciis 12 radio.stacioj en 10 landoj. En 1966 du.dek tri radio.stacioj el 15 landoj el.sendis 2290 program.erojn en Esper.anto.

Hodiaŭ dank' al la inter.reta el.sand.ado de Esper.antaj radio.programoj, oni povas aŭskulti ilin kun tre bona son.kvalito. Por trovi pri la radiaj Esper.anto.programoj vi povas serĉi en la revuoj de Esper.anto, aŭ en inter.reto (pri "esperanto radio programo" ekz-e). Ankaŭ per inter.reto vi povas aŭskulti al multaj Esperanto.programoj, ekz-e per Esperanto Radio Arkivo oni povas aŭskulti al pli ol

1400 program.eroj en Esper.anto el 26 diversaj radio.stacioj de la mondo (serĉu en inter.reto).

Nun oni eĉ planas por el.send.ado de tele.vidaj programoj en Esper.anto pere de inter.reto. Tiel ankaŭ tele.vidajn produktojn en Esper.anto oni povos util.igi tra la mondo kun bona son- kaj bild-kvalito. Tio certe estos revolucia ŝanĝo en la mondo de amas.komunik.iloj, ĉar ĝis nun ĉiuj inter.naciaj el.sendoj de tele.vidaj programoj okazis pere de satelitoj kaj en naciaj lingvoj, kiujn oni ne povas lerni facile – kaj kiujn certe oni ne povas majstri kontent.ige. Tamen, la inter.retaj esperant.lingvaj programoj estos kaj ricev.eblaj sen satelit.diskoj, kaj ties lingvon ĉiu persono povas majstri dum relative mal.longa tempo.

Kiel multaj opinias, la fururo de inter.reto mult.ege helpis kaj helpas al la dis.vast.igo de Esper.anto, ĉar ĝis nun nur la sub.ten.adoj kaj pen.adoj de la popoloj konservis kaj antaŭ.e.n.igis la ideon de Esper.anto, kaj nun inter.reto estas plia rimedo en la manoj de la popoloj por pli.igi la inform.adon pri la Inter.nacia Lingvo. Laŭ ies diraĵo, “Esper.anto kaj interreto estas konstruitaj unu por la alia”. Plej.eble inter.reto progres.igos Esper.anton en la mondo, kaj Esper.anto sia.vice pli facil.igos inter.nacian util.ig.adon de inter.reto por ĉiuj homoj kun diversaj patr.inaj kaj naciaj lingvoj.

Novaj vortoj kaj kun.metoj تازه کلمه‌ها و ترکیب‌های

angla (فرد) انگلیسی anglo انگلستان Angl.io, Angl.ujo (زبان) انگلیسی angla
 arkivo متصدی بایگانی، بایگان arkiv.isto آرشیو تاریخی histori.arkivo آرشیو، بایگانی arkivo
 antaŭ پیش گفتار antaŭ.parolo پیش بردن antaŭ.e.n.igi به پیش antaŭ.e.n. جلو، پیش antaŭ
 bezono مورد احتیاج bezon.ata احتیاجات bezon.aĵoj احتیاج داشتن bezoni احتیاج
 eble به احتمال ضعیف ebl.ete به احتمال زیاد plej.eble محتمل، ممکن ebla احتمالاً، شاید eble
 esti غیابی for.esta حضورى ĉe.esta غایب بودن for.esti حضور داشتن، حاضر بودن ĉe.esti بودن esti
 facila آسان ساختن، تسهیل کردن facil.igi به آسانی facile آسان کردن facil.igi آسان facila
 komenci مبتدی komenc.anto شروع شدن komenc.iĝi شروع، آغاز komenco شروع کردن komenci
 milito ضد جنگ kontraŭ.milita جنگ جهانی mond.milito جنگ milito
 okazo بر پا کردن okaz.igi اتفاق افتادن okazi واقعه، اتفاق okazaĵo فرصت okazo
 progreso پیشرفته progres.inta پیشرفت دادن progres.igi پیشرفت کردن progresi پیشرفت progreso
 reto اینترنتی inter.reta اینترنت inter.reto شبکه، تور reto
 ricevi گیرنده ricev.ilo دریافت کننده ricev.anto قابل دریافت ricev.ebla دریافت کردن ricevi
 sendi فرستنده (شخص) send.anto پخش کردن el.sendi فرستادن، ارسال کردن sendi

stacio (ساختمان) ایستگاه قطار staci.domo trajn.stacio, stacio ایستگاه رادیویی radi.o.stacio
 unu وحدت بخشیدن unu.ec.igi وحدت، یگانگی unu.eco یکمین، اولین unua یک
 Usono آمریکایی usona (فرد) آمریکایی uson.ano (ایالات متحد)
 utila بهره‌برداری، استفاده util.ig.ado استفاده کردن util.igi سود، فایده utilo سودمند، مفید
 vico به‌نوبت، به‌صاف laŭvice به‌صاف شدن en.vic.iĝi به نوبه‌ی خود si.a.vice نوبت، صف
 vidi (دستگاه) تلویزیون tele.vid.ilo با تلویزیون دیدن tele.vidi دیده‌شده دیدن vid.ita

Ekzercoj

A- Plenigu:

1. Ĉiu lingvo bezonas havi komunikilojn.
2. Ĉar Esperantistoj loĝas dise tra la, ili bezonas pli da komunikiloj.
3. Radiaj programoj en Esperanto en la jaro 1922.
4. Kiam la dua mondmilito komenciĝis Esperantaj radio-elsendoj

Respondu:

1. Kial ĉiu vivanta lingvo bezonas komunikilojn?
2. Kial Esperanto pli ol aliaj lingvoj bezonas komunikilojn?
3. Kial radiaj kaj televidaj programoj en Esperanto estas gravaj?
4. Kiom da landoj elsendis Esperantajn radioprogramojn antaŭ la dua mondmilito?
5. Kiom da radiostacioj elsendis programojn en Esperanto en la jaro 1966?
6. Kiel oni nun povas aŭskulti al la Esperantaj radioj kun bona sonkvalito?
7. La interretaj televidprogramoj kiel diferencas de alilingvaj programoj internaciaj?

Skribu:

1. Aŭskultu al Esperanta radioprogramero, kaj skribu pri ĝi.
2. Kiajn programerojn vi ŝatus aŭskulti el esperantlingvaj radioj?
3. Kio estus viaj plej ŝatataj televid-programeroj en Esperanto?

Diskutu:

1. Kiajn diferencojn havas internaciaj programoj – radiaj aŭ televidaj – kiuj elsendiĝas en Esperanto, kun tiuj en naciaj lingvoj, kiel la franca kaj la angla?
2. Kio pli efikas: radia aŭ teledida programo? Kial?
 okul.isto چشم‌پزشک okul.isto چشم‌گیر okul.frapa چشم okul.haro
 perdi گم کرده، ازدست داده perd.inta گم شده، ازدست رفته perd.ita ازدست دادن، گم کردن
 periodo دوره‌ای perioda نشریات (دوره‌ای) period.aĵoj دوره‌ها
 populara مردمی بودن، محبوبیت popular.eco مردمی شدن iĝi populara مردمی
 profesio حرفه‌ای، شغلی profesia شخص حرفه‌ای profesio شغل، حرفه profesio
 inter.reta اینترنتی (شبکه‌ی جهانی) inter.reto اینترنت شبکه reto
 revuo مشترکان مجله revu.abon.antoj شماره‌ی مجله revu.numero نشریه (ی تخصصی) revuo
 unu وحدت‌بخشی unu.ec.ig.ado واحد(اندازه‌گیری) unu.eco یگانگی unu.eco یک
 al.veni آمدن به، رسیدن al.veni آینده، بعدی venonta همایش kun.veno آمدن veni
 رساندن
 versio روایت بتا (آزمایشی، در مورد برنامه‌های کامپیوتری) β.version به‌روایت او li.a.versio روایت

Ekzercoj

A- Plenigu:

1. Gazetaro de Esperanto multe helpis al de la lingvo.
2. Nuntempe kiam interretaj revuoj multas, ankoraŭ Esperantaj periodaĵoj ne sian gravan signifon por la movado.
3. Revuo "Esperanto" estas la organo de UEA.
4. "Konkanto" estas du-monata revuo internacia.
5. En ĉirkaŭ 90 landoj "Kontakto" havas
6. "Fonto" estas revuo en Esperanto.

Respondu:


1. Kial Esperanto-gazetaro ludis gravan rolon en disvolvado de Esperanto?
2. Kiel nomiĝas la oficiala organo de UEA?
3. Kio estas la nomo de UMEA-revuo?
4. En kiuj jaroj fondiĝis revuoj "Esper.anto" kaj "Kontakto"?

Skribu:

1. Traduku persan artikol(er)on en Esperanton.
2. Traduku artikol(er)on el Esperanta revuo en la persan.

Diskutu:

1. Komparu la libron kun la periodaĵo.
2. Kiaj revuoj estus pli taŭgaj por aperi en Esperanto?
3. Kiu donas pli vastan vidon al oni: nacia aŭ internacia gazeto?
4. Ĉu internacia periodaĵo povas aperi en nacia lingvo?

درس بیست و دوم: آشنایی با کتب اسپرانتو	
22-a Leciono: Esperantaj Libroj	
	
Piron kaj Sekelj, du el la plej leg.ataj Esper.anto.verk.istoj de la nuna tempo ¹	

Eĉ nun – kiam komput.iloj kaj inter.reto furoras - la libro ankoraŭ estas la plej fid.inda kaj efika komunik.ilo. De antaŭ jar.miloj la libro estis la plej daŭr.ema (rest.ema) komunik.ilo kaj por sam.temp.uloj kaj por postaj generacioj. Eĉ en hodiaŭa mondo, la bazo de multaj komput.ilaj programoj kaj inter.retaj paĝoj estas ... la libroj.

La libroj ludis gravan rolon ankaŭ en la Esper.ant.o.mondo. La Unua Libro, kiun L.L. Zamenhof (1859-1917) publik.igis en 1887, fakte estis la nask.iĝo de la nova inter.nacia lingvo Esper.anto. Ek.de tiam, miloj da libroj el.don.iĝis tra la mondo pri aŭ en Esper.anto. Jene ni provas klasifiki Esper.antajn librojn, kaj en iuj kategorioj prezentas ekzemplon:

1. libroj en Esper.anto
 - a. originalaj verkoj
 - i. instru.ado
 1. (mem)lerno.libroj
 2. vort.aroj
 - ii. prozo
 1. romanoj
 2. noveloj
 3. rakontoj
 4. proverboj
 5. biograf.ioj
 - iii. poezio
 - iv. teatr.aĵoj

¹ Fotoj de interreto.

- b. traduk.itaĵ verkoj
 - i. prozo
 - 1. romanoj
 - 2. noveloj
 - 3. rakontoj
 - 4. proverboj
 - 5. biograf.ioj
 - ii. poezio
 - iii. teatr.aĵoj
- 2. libroj pri Esper.anto en aliaj lingvoj
 - a. (mem)lerno.libroj
 - b. vort.aroj
 - c. inform.iloj

Elpafu la Sagon estas titolo de valora verko de Tibor Sekelj (1912-1988), tre fama esperant.ista verk.isto, poeto, traduk.isto kaj mond.vojaĝ.anto. Ĝi, kiel la sub.titolo diras, estas *el la buŝa poezio de la mondo*. Li pas.igis multe da sia tempo en vojaĝoj al plej foraj kaj plej diversaj lokoj en la mondo.

La libro en.havas tradukon de 138 poemoj kaj kantoj de tre diversaj triboj kaj popoloj, kiujn Sekelj vizitis dum siaj vojaĝoj al ĉiuj kontinentoj. Li tre bele esperant.igis ilin kaj pere de bonaj notoj klar.igis pri ne.kon.ataĵ temoj kaj vortoj. Anstataŭ en.konduko, Sekelj verkis tre human.ecan poem.eton belan, kies nomo estas la titolo de la verko:

El.pafu la Sagon

El.pafu la sagon kuraĝa toao*
 sed tiel ke ĝi neniam mort.igu,
 nenium ĝi vundu.
 El.pafu la sagon brava ĉas.isto,
 sed ke ĝi ne vundu beston,
 ne tra.boru arbon, ne de.ŝiru folion.
 El.pafu la sagon direkten al fora stelo,
 ke ĝi dis.ŝut.igu en mil fajr.erojn,
 ke ĝi lum.igu la vojon al ĉiu
 kiu vagas ĉi.nokte.
 Ke ĝi al.portu momenton de belo
 en la nokton de tiuj kiuj mal.gajas.²

*toao, kiel Sekelj pied.note skribis, estas el maoria lingvo kaj signifas “plen.aĝa plen.forta viro ĉiam preta por batali.”

² SEKELJ, Tibor. *Elpafu la sagon*, Rotterdam: UEA, 1983, 187 p., p. 17.

Ĉu Ni Kun.venis Vane? estas titolo de originala romano en Esper.anto far Johán Valano, kio estas pseŭdonimo de profesoro Claude Piron (1931-), tre fama svisa esperant.ista psikologo kaj verk.isto. Por gust.umi lian arto.plenan verk.stilon, ni legas la unuajn liniojn de la romano:

“Per tre mal.rapida gesto, kiun neniuj povis rimarki, Miŝa Viktoroviĉ Kaganov tuŝis la mal.dekstran flankon de sia jako, je la nivelo de l’ koro, kaj la minimumaj palpa kaj aŭda perceptoj sufiĉis por for.igi momente lian dubon: la gazeto plu trov.iĝis en la interna poŝo. Lin torturis intensa deziro ĝin rigardi, sed tiun li sub.premis: povus esti ja danĝere.

.... La racio diris, ke li estis perfekte sin.garda, kaj ke aŭtoritatoj povus suspekti nenion, sed mal.oftes racio povas pac.igi koron turmento.plenan, kaj ĉi.foje ĝi pli.a.foje fiaskis.”³

En la lasta frazo oni brile vidas la fundan konon de la psikologa verkisto.

Sep.dek Sep Ŝlos.iloj por la Japania Civilizacio estas dokumenta verko pri Japanio. Ĝi estas plur.aŭtora verko kon.ig.anta Japanion divers.flanke. La libro el.don.iĝis Esperante, kun traduko de Geoffrey Sutton, en 1987 okaze de la cent.jar.iĝo de Esper.anto. En parto nom.ita *Komput.iloj kaj Robotoj* ni legas:

“Ankaŭ la fabriko havas novan vizaĝon: en la munto.ĉeno laboras robotoj apud homoj. Multaj taskoj pri farb.ado, veld.ado kaj munt.ado trans.iris el homaj manoj al robotoj, kaj ankaŭ kontrolaj kaj mezuraj robotoj jam funkci.adas. En Japanio trov.iĝas 67 mil labor.antaj robotoj (cifero por 1981), kio estas 70 pro.centoj de ĉiuj uz.ataj en la mondo. Plie, Japanio, per siaj 20 mil unuoj jare, produktas pli da robotoj ol iu ajn alia lando.”⁴

En alia parto de la libro ni legas pri Japanio laŭ Marko Polo:

“Cipangu estas mal.proksima insulo en la maro ĉirkaŭ mil kvin.cent mejlojn de Manzi. Ĝi estas tre granda insulo ... (La tieaj homoj) estas idol.anoj kaj estas sub.uloj al neniuj alia ŝtato. Ordinare ili havas grandan abundon da oro, sed la kialo de tio estas, ke ili minas oron en la insulo, kaj ilia reĝo mal.permesas eksporti la oron. Ankaŭ ĉar ĝi estas mal.proksima de la kontinento, preskaŭ neniuj komerc.istoj vizitas ĝin, tiel ke la kvanto de oro en ilia posedo estas vere tre granda.”⁵

³ VALANO, Johán. *Ĉu ni kunvenis vane?*, Antverpeno, La Laguna: TK/Stafeto, 1982, 180 p., p. 5.

⁴ UMESAO-Tadao. *Sepdek-sep ŝlosiloj por la japana civilizacio*, trad. Geoffrey Sutton, Tokio: Japania Komisiono por la Centjara Jubileo de Esperanto, 1987, 355 p., p. 288.

⁵ Ibid. p. 118.

کلمه‌ها و ترکیب‌های تازه Novaj vortoj kaj kun.metoj

abundo نادر، کم‌یاب mal.abunda فراوان abundi بودن فراوان abunda فراوانی abundo
 aŭtoritato با قدرت aŭtoritate مقامات aŭtoritatoj مقام (مسئول) aŭtoritato
 buŝo به‌طور افواهی buŝe شفاهی، افواهی buŝa دهان buŝo
 cifero با ارقام cifere رقمی، عددی cifera رقم، عدد cifero
 civilizacio مربوط به پیش از تمدن antaŭ.civilizacia تمدن civilizacia تمدن civilizacio
 daŭri ادامه یافتن iĝi ادامه دادن daŭr.igi بادوام daŭr.ema ادامه داشتن daŭri
 dubo بی‌شک sen.dube مشکوک dub.indu شکاک dub.ema شک داشتن به dubi شک dubo
 fabriko کارخانه‌ای fabriki در کارخانه ساختن fabriki کارخانه fabriko
 fiaski شکست بزرگ fiask.ego شکست خورده fiask.inta شکست fiasco شکست خوردن fiaski
 fidi شخص قابل اعتماد، معتمد fid.ind.ulo قابل اعتماد fid.indu اعتماد fido اعتماد کردن به fidi
 furoro آدمی که نامش برسر زبان‌هاست furor.ulo برسرزبان‌ها بودن furori اشتها، رواج، همه‌گیری furoro
 generacio شجره (شناسی) generaci.aro مربوط به نسل generacia نسل generacio
 gesto ژست گرفتن gesti با ژست geste ژست، حالت gesto
 gusto شورمز (ه) sal.gusta خوش‌مزه bon.gusta چشیدن، مزه کردن gust.umi مزه gusto
 idolo بت کردن idol.igi بت‌پرست idol.ano بت‌پرستی idol.ismo بُت idolo
 informo مَطْلَع inform.ita وسیله‌ی اطلاع‌رسانی، رسانه inform.ilo اطلاع informo
 insulo کشور جزیره‌ای insul.lando مجمع‌الجزایر insul.aro جزیره‌نشین insul.ano جزیره insulo
 klasifiki (عمل) طبقه‌بندی klasifik.ado نظام طبقه‌بندی klasifiko طبقه‌بندی کردن klasifiki
 komerco تاجر komerc.isto تجارت کردن komerci تجارت komerco
 lerni (کتاب) خودآموز mem.lern.o.libro کتاب آموزشی lern.o.libro فرا گرفتن lerni
 mezuri بی‌اندازه (زیاد) sen.mezura اندازه (گیری) mezuro اندازه گرفتن mezuri
 naski جشن تولد nask.iĝi تولد دوباره re.nask.iĝi تولد naski به‌دنیا آوردن naski
 nivelo سطح متوسطه mez.nivelo مسطح کردن niveli هم‌سطح nivela (sam.) سطح nivelo
 novela مربوط به ناول novela نویسنده‌ی داستان‌های کوتاه novel.isto داستان کوتاه، ناول novela
 originala اصالت original.eco (نسخه‌ی) اصل originalo اصل، اصل originala
 oro حلقه‌ی طلا or.ringo طلاجات or.aĵoj طلائی ora طلا oro
 pafi پرتاب، شلیک pafo محکم پرتاب کردن (تیر) el.pafi پرتاب کردن (تیر) pafi

palpi با لامسه palpe palp.ebla ملموس لمس کردن
 percepto قابل درک percept.ebla درک کردن percepti احساس، ادراک
 poezio قطعه‌ی منظوم poezi.aĵo منظوم، به شعر poezia نظم، شعر
 posedi صاحب posed.anto تصاحب posedo صاحب بودن
 poŝo کتاب جیبی poŝ.libro در جیب گذاشتن en.poŝ.igi جیب
 premo تحت فشار premi فشار دادن sub.premi فشار دادن
 proverbo مربوط به ضرب‌المثل proverba مجموعه‌ی ضرب‌المثل proverb.aro ضرب‌المثل
 prozo نثرنویس proz.isto قطعه‌ی نثر proz.aĵo نثر proza منشور prozo نثر
 psik.ologio روان‌شناختی psik.ologio روان‌شناسی psik.ologio روان‌شناس
 racio با خردمندی racie خردمند(انه) racia عقل، خرد
 rakonto مجموعه‌ی حکایات rakont.aro حکایت کردن rakonti حکایت
 resti بقیای rest.aĵoj اقامت‌گاه rest.ad.ejo مانا rest.ema (به‌جا) ماندن
 rimarki شایسته‌ی توجه rimark.inda توجه rimarko ملاحظه کردن
 romano مربوط به رُمان romana رمان‌نویس roman isto داستان بلند، رُمان
 sago تیردان sag ujo (مثل تیر) پرتاب شدن sagi تیر (تیرکمان)
 stilo فاقد سبک sen.stila خوش سبک bon.stila سبک تالیف verk.stilo سبک
 suspekti مظنون، بدگمان suspekt.ema ظن suspekto ظنین شدن به
 teatro مربوط به تئاتر teatra نمایش‌نامه teatr.aĵo (سالن) تئاتر
 tempo معاصران sam.temp.uloj هم‌زمان، معاصر sam.tempa زمان، وقت
 torturo با عذاب torture عذاب دادن torturi عذاب، شکنجه
 traduko ترجمه شده traduk.ita مترجم traduk.into ترجمه
 verko مجموعه‌ی تالیفات verk.aro مولف verk.isto اثر (ادبی یا هنری)
 vojaĝo جهان‌گرد mond.vojaĝ.anto مسافرت کردن vojaĝi سفر

Ekzercoj

A- Plenigu:

1. Nuntempe komputiloj kaj interreto en la mondo.
2. La libro ankoraŭ estas la plej daŭrema (restema)
3. La libroj ludis grandan ankaŭ en la Esperanto-mondo.
4. Tibor Sekelj estas tre fama esperantista verkisto, poeto, tradukisto kaj
5. Claude Piron estas tre fama svisa esperantista kaj verkisto.

Respondu:

1. Kiel oni povas klasifiki Esperanto-librojn?
2. Kiom da robotoj ekzistis en Japanio en 1981?
3. Kial laŭ Marko Polo Japanio estis tre riĉa?
4. Kio estas pseŭdonimo de prof. Claude Piron?
5. En la poemo *Elpafu la Sagon*, kion ĉefan diras Sekelj?
6. Kiom da poemoj kaj kantoj estas tradukitaj far Sekelj en *Elpafu la Sagon*?

Skribu:

1. Traduku persan kanton aŭ poemon en Esperanton.
2. Traduku la poemon *Elpafu la Sagon* en la persan.

Diskutu:

1. Ĉu iam libroj malaperos, aŭ ili nur ŝanĝos sian formon?
2. Kian utilon havas tradukado de Esperantaj originalaj verkoj en naciajn lingvojn?

3- سطح پیش‌رفته

3- La Progresiga Nivel

درس بیست و سوم: آشنایی با شعر اسپرانتو

23-a Leciono: Esperantaj Poemoj



Kalocsay kaj Auld, inter la plej elstaraj poetoj de Esperanto¹

Esperanton kreis doktoro Ludoviko Lazaro Zamenhof (1859-1917). Li naskiĝis en Bjalistoko, urbo en nuna polando.

Zamenhof publikigis Esperanton en la jaro 1887. Ekde tiam, dum 30 jaroj, ĝis sia frua forpaso, li ankoraŭ laboris por Esperanto. Li multe tradukis kaj verkis en la nova lingvo. Zamenhof estis kaj sciencisto kaj artisto: li studis medicinon kaj poste studis plu por fariĝi okulisto, kaj samtempe li estis muzikisto kaj povis bone ludi pianon. Zamenhof verkis belajn poemojn. Fakte li estas la unua poeto de Esperanto. Jen unu el liaj poemoj, en kiu li bele aludas pri tio ke li oferis sian junecon al Esperanto:

Mia penso

Sur la kampo for de l' mondo,
antaŭ nokto de somero,
amikino en la rondo
kantas kanton pri l' espero.
Kaj pri vivo detruita
ŝi rakontas kompatante, –
mia vundo refrapita
min doloras resangante.

"Ĉu vi dormas? Ho, sinjoro,
kial tia senmoveco?
Ha, kredinde rememoro
el la kara infaneco?"
Kion diri? Ne ploranta
povis esti parolado
kun fraŭlino ripozanta

¹ Fotoj de interreto.

post somera promen.ado!

Mia penso kaj turmento,
kaj doloroj kaj esperoj!
Kiom de mi en silento
al vi iris jam oferoj!
Kion havis mi plej karan –
la jun.econ – mi plor.anta
metis mem sur la altaron
de la devo ordon.anta!

Fajron sentas mi interne,
vivi ankaŭ mi deziras, –
io pelas min eterne,
se mi al gaj.uloj iras...
Se ne plaĉas al la sorto
mia peno kaj laboro –
venu tuj al mi la morto,
en espero – sen doloro!

Iom post iom trov.iĝis aliaj Esper.anto.poetoj en multaj landoj de la mondo. Ekzemple en libro titol.ita *Tut.monda Sonoro* traduk.ita de Kálmán Kalocsay (1891-1976), estas 581 traduk.itaj poemoj de 185 poetoj el multaj landoj kaj lingvoj. Ankaŭ en *Esper.anta Antologio, Poemoj 1887-1981* ekzistas 850 originalaj poemoj de 163 esper.ant.istaj poetoj el tre multaj kaj diversaj landoj de la mondo: de Ĉin.io, Kore.io kaj Japan.io ĝis Sved.io, Usono kaj afrikaj landoj. Jen poemo de John Sharp Dinwoodie, elp. Ĝan Ŝarp Dinŭudi, (1904-1980) elekt.ita el tiu ĉi valora verko:

Sol.eco

Ŝaf.isto iras sur mont.aro,
Kie bird.kantoj sonas;
Kun la Natur' en solidaro
Sol.econ li ne konas.

Sed iras mi sur urbo.stratoj,
Kie la bru' sen.ĉesas;
Kaj meze inter la hom.fratoj
fremd.ule mi sol.ecas.

Esperanto jam havis ankaŭ multajn anonimajn poetojn, kiuj verkis belajn poemojn. Ekzemple oni ne konas la poeton de la suba bela poemo:

Parolu nun ...

Se vi ŝatas ies farojn,
Ne atendu longajn jarojn,
Ĝis li venkos ĉiajn barojn
Ĉe la tasko.

Jam nun sonu via vorto
Kuraĝiga. Pli da forto
Havos ĝi ol – post la morto –
Flora fasko

Kiam li en ĉerko kuŝos,
Via helpo ne lin tuŝos,
Nek al plua peno puŝos
Danka vorto

Sonu **nun** la laŭd' amika!
Vana estos pli efika
Epitafo retorika
Post la morto

Kiel videble, bela ekzemplo de aliteracio esprimiĝis en la verso “Nek al **plua peno puŝos**/ Danka vorto”.

La poemo memorigas nin, la pers. lingvanojn, i.a. al la fama gazalo de Moŭlana (Rumi) en Ĥams.gazalaro:

*Bija ta qydre jekdigyr bedanim
Ke ta nagh ze jekdigyr nymanim
Kyriman ĝan fydaje dust kyrdynd
Sygi bogzar, ma hym myrdomanim
Gyhi hoŝ-del ŝyvi yz myn ke mirym
Ĉera morde-pyrysto ĥysme ĝanim?
Ĉo byr gurym beĥahi buse dadyn
Roĥym ra buse deh, kyknun hymanim
(yz: Gozideje Qzylyjjate Ŝyms)*

**Ni ĝuadu unu l' alian, ĉi horas
Ĉar ekperdi unu l' alian, ne foras
Por amiko vivon oferis la nobluloj
Forlasu vi la hundecon, ankaŭ ni homas
Min vi ja ekamos, kiam mi mortintus**

Kial morton – kaj ne vivon - ni adoras
Ĉar ĉe mia tomb' vi kisos al epitaf'
Nun kisu al mia vizaĝ', ni sam.homas
(el: Elekt.itaj Ŝams.gazaloj)

کلمه‌ها و ترکیب‌های تازه z kun.metoj Novaj vortoj

aliteracio واج‌آرایی aliteracia واج‌آراسته aliteraci.eco واج‌آراستگی
 altaro مربوط به قربان‌گاه altara قربان‌گاه altare قربان‌گاه altaro
 arto هنر، هنرمندانه art.o.plena اثر هنری art.verko هنرمند art.isto هنر
 ĉerko مربوط به تابوت ĉerka وسیله‌ی نقلیه‌ی تابوت ĉerk.vetur.ilo تابوت
 detruui خراب شده، مخروب، مخروبه detru.ita خراب شدن detru.iĝi خراب کردن
 elekti انتخاب شدن elekt.iĝi انتخابات elek.ado منتخب elekt.ita انتخاب کردن
 epitafo زبان سنگ‌نوشته‌ی منظوم مزار vers.epitafo سنگ‌نوشته‌ی مزار
 سنگ‌نوشته‌ی مزار
 fasko طُره (مو) har.fask.eto دسته‌ی کوچک fask.eto دسته (مو، گُل، گندم)
 fremda بیگانه fremd.ulo مانند بیگانه fremd.ule شخص بیگانه fremd.ulo بیگانه fremda
 kanto مجموعه‌آواز kant.aro آوازخوان kant.isto (آواز) خواندن kanti آواز
 kompati بدون ترجمه sen.kimpate ترجمه kompato قابل ترجمه kompat.indo ترجمه کردن
 kreii آفریده شده kre.ita آفرینش kre.ado آفریده kre.aĵo آفریننده kre.into آفریدن
 kuraĝa ترسو mal.kuraĝa شجاعت‌بخش kuraĝ.iga تشجیع کردن kuraĝ.igi شجاع
 mondo (تمام) جهانی tut.monda زبان جهانی mond.lingvo دنیا، جهان
 movo دوست‌دار حرکت mov.iĝ.ema رکود sen.mov.eco بی‌حرکت sen.mova حرکت
 muziko قطعه‌ی موسیقی muzik.aĵo موسیقی‌دان، نوازنده muzik.isto موسیقی
 naski جشن تولد nask.iĝ.festo به دنیا آمدن، زاییده شدن nask.iĝi به دنیا آوردن، زاییدن
 nobla کریمانه nobl(ul)e کریمان nobl.uloj با کرامت noble کریم nobla
 originala متنی اصیل original.aĵo به‌طور اصیل originale اصیل (غیر ترجمه) originala
 parkeri از حفظ، از بر حفظ کردن، از بر کردن parker.igi حفظ بودن، از بر داشتن parkeri
 peli دور راندن for.peli پس‌راندن re.peli دور کننده for.pela راندن peli
 piano برای پیانو piana نوازنده‌ی پیانو pian.isto پیانو piano

retoro گفته‌ای فصیح retor.aĵo علم فصاحت retor.iko استاد سخن
 ŝafo بره ŝaf.ido گله‌ی گوسفند ŝaf.aro چوپان ŝaf.isto گوسفند
 sango در حال خون‌ریزی مجدد re.sang.ante خون آمدن sangi خون
 solidar(ec)o ایجاد هم‌بستگی کردن، هم‌بسته solidar.igi هم‌بستگی دار، هم‌بسته solidara هم‌بستگی
 ساختن
 stari مقاومت کردن (در برابر) kontraŭ.stari برجسته، ممتاز el.stara برجسته بودن el.stari ایستادن
 tombo مربوط به قبر tomba قبرستان tomb.ejo مقبره
 traduki ترجمه (شده) traduk.ita مترجم traduk.into ترجمه کردن
 turmento عذاب آور، رنج‌دهنده turmenta رنج دادن به turmenti عذاب
 tuŝi قابل لمس، ملموس tuŝ.ebla لامسه، بساویی tuŝ.ado لمس کردن
 vango با گونه‌ی باد کرده puf.vanga سیلی vang.o.frapo لُپ گونه، لُپ

Ekzercoj

A- Plenigu:

1. Doktoro Zamenhof Esperanton.
2. Esperanto kreiĝis en la jaro
3. Zamenhof naskiĝis en la jaro en urbo
4. La unua poeto de Esperanto estas

B- Respondu:

1. En kiu jaro naskiĝis Kálmán Kalocsay?
2. Kiel nomiĝas la internacia poem-verko, kiun tradukis Kalocsay?
3. Dum kiu periodo verkiĝis la originalaj poemoj de Esper.anto eldonitaj en la libro *Esper.anta Antologio*?
4. Kiom da Esperanto-poetoj kontribuis al la *Esperanta Antologio*?

C- Skribu:


1. Skribu Esperantan poemon en prozo.
2. Parkerigu (skribu en via menso) Esperantan poemon.
3. Skribu pri aliteracio kaj donu ekzemplon en Esperanta kaj/aŭ persa poem(j).

Ĉ- Diskutu:

1. Ĉu en logika lingvo kiel Esperanto, povas ekzisti poezio?
2. Kio diferencigas poezion de prozo?

درس بیست و چهارم: آشنایی با ضرب‌المثل‌های اسپرانتو

24-a Leciono: Esperanta Proverbaro



La kreinto de
Esperanto

Sen.duba geni.ulo, L.L. Zamenhof, la kre.into de Esper.anto, multe verkis ankaŭ pri proverboj.¹

Ver.ŝajne la proverboj ekzistas en ĉiuj lingvoj. Ili kaj bel.igas la parolon kaj mal.longe diras longan aferon. Ili iam uz.iĝas kiel pruvo, aliam kiel atest.aĵo aŭ averto. En multaj proverboj, la simpla kaj familiara lingv.aĵo, pli.plaĉ.igas ilin por ni. Eble jena esper.anta proverbo klar.igas la kialon de tiu ĉi fakto:

Venas proverbo el popola la cerbo.

Ne neg.eblas la utiloj de proverboj en la lingvoj, ĉar fakte ili estas la rezultoj de spertoj de multaj pas.intaj generacioj. Sam.kiel alia esper.anta proverbo diras:

Proverbo estas sperto, proverbo estas averto.

Proverboj ĉe iran.anoj

Ni iran.anoj bone konas proverbojn, ĉar la persa lingvo estas tre riĉa je divers.specaj proverboj. Unu.flanke kaj niaj mal.novaj kaj niaj sam.tempaj verk.istoj multe util.igis proverbojn en siaj verkoj, kaj ali.flanke nia popolo tre emas al cit.ado de proverboj en siaj inter.paroloj.

Inter.naci.eco de proverboj

Ne ĉiu proverbo estas kompren.ebla por ĉiuj – aŭ almenaŭ por plej.multo de – nacioj kaj kulturoj. Ekzemple eskimo eble ne komprenas kion sognifas: **kun.porti karvion al Kermano** (zire be Kerman bordyn). Ĉar li probable nek scias pri la karvio nek konas Kermanon, nek konstatas ke Kermano tre riĉas je plej bonaj specioj de karvio... Same estas pri alia persa proverbo **kun.porti vitr.aĵon al Halabo** (abgine

¹ Bildoj de interreto.

be hylyb bordyn) aŭ angla proverbo kun tre simila signifo: **kun.porti (ter)karbon al Novkastelo** (*to carry coal to Newcastle*). Tamen saman signifon oni povas komuniki trans.nacie per pli kompren.eblaj elementoj, ekzemple: **kun.porti lignon al arb.aro**, ĉar en la plej diversaj lokoj de la tero oni konas lignon kaj arb.aron.

Esperant.igi persajn proverbojn

Multaj nunaj proverboj en la persa lingvo devenas de famaj verkoj de grand.uloj kiel Sadio, Hafezo kaj Moŭlana. Jen kelkaj ekzemploj:

Eduk.ado por ne.ind.uloj estas kiel (metado de) juglando sur kupolon (*Tyrbijyt nayhl ra ĉun gerdykan byr gonbyd yst*).

Fino de l' nokto mal.hela estos hela (*Pajane ŝybe sijyh sepid yst*).

Certe ekzistas ankaŭ la malo, nome mult.am verk.isto util.igis la jam popular.iĝ.intan provrbon en sia verk.aĵo.

Multaj persaj proverboj, se traduk.itaj en Esper.anton (aŭ aliajn lingvojn) povas kompren.iĝi inter.nacie, ĉar iliaj eroj estas inter.nacie re.kon.eblaj, jen kelkaj ekzemploj:

En urbo de l' blind.uloj reĝas la unu.okul.ulo (*Dyr ŝyhre kuran adyme jek-ĉyŝm padeŝah yst*). En *Esper.anta Proverb.aro* de L.L. Zamanhof, ekzistas tre simila proverbo: **inter la blind.uloj reĝas la srab.uloj**.

De tero ne pluvas al la ĉielo (*Yz zymin be asman nemibaryd*)

Iam por Esper.anta proverbo ekzistas multaj persaj proveboj, ekz-e por:

Pli bona estas saĝa mal.amiko, ol mal.saĝa amiko.

En la persa i.a. ekzistas la jenaj:

Ĥysme dana ke doŝmyne ĝan yst, behtyr yz dusti ke nadan yst (Qaani)

Doŝmyne dana ke qyme ĝan bovyd, behtyr yz an dust ke nadan bovyd (Nezami)

(Dusti ba myrdome dana nekust,) Doŝmyne dana beh yz nadane dust (Moŭlana)

Doŝmyne dana bolyndyt mikonyd, byr zyminyt mizynyd nadane dust

Rimo de proverboj

Plej. ofte proverboj ĝuas rimon aŭ/kaj aliajn poeziajn ecojn. Tio krom bel.ig.ado, kaj plaĉ.ig.ado, certe heplas al ilia pli facila parker.eblo. Jen kelkaj mal.grandaj kaj rimaj Esper.anto.proverboj el la Zamenhofa *Esper.anta Proverb.aro*:

Amo pli kora, dis.iĝo pli dolora.

Amo super.mezura ne estas plezura.

Bono far.ita ne estas perd.ita.

De l' koro spegulo estas la okulo.

Esper.anta proverb.aro

Multaj esper.ant.istoj engaĝ.iĝis pri proverboj kaj est.igis riĉan proverb.aron en Esper.anto. Zamenhof mem kolektis multajn Esper.antajn proverbojn, en libron titol.itan “Esper.anta Proverb.aro”. Versio de ĝi estas al.ir.ebla sur la inter.reto. Por trovi ĝin, vi povas serĉi por ties nomo. La libro estas 138-paĝa kaj en.tenas multajn proverbojn laŭ alfabeto ordo de ties unuaj literoj. Jen kelkaj proverboj el la ĉapitro U (proverboj, kiuj komenc.iĝas per u-litero):

Unu fava ŝafo tutan ŝaf.aron infektas.

(Jek boze gyr gyllei ra gyr mikonyd)

Unu hirundo printempon ne al.portas.

(Ba jek gol byhar nemiŝyvyd)

Unu.eco donas fort.econ.

(Vahdyt qovvyt mebyĥŝyd)

Urtikon frosto ne difektas.

(Badenĝane bym afyt nydaryd)

Ekzistas ankaŭ aliaj TTT.ejoj en kiuj la proverboj estas ord.ig.itaj aŭ trov.eblaj laŭ iliaj temoj. Ekzemple oni povas facile trovi ĉiujn Esper.antajn proverbojn pri *virinoj* aŭ *geedziĝo*.

کلمه‌ها و ترکیب‌های تازه kun.metoj kaj novaj vortoj

averto بدون اخطار sen.averte اخطار دهنده averti اخطار دادن
cerbo به ذهن سپردن en.cerb.igi به مغز فشار آوردن cerb.umi مغز، مُخ
ĉielo رنگین کمان (کمان آسمانی) ĉiel.arko زیر آسمان sub.ĉiela آسمانی ĉiela آسمان
citi گیومه cit.ilo مطلب نقل شده cit.aĵo نقل قول cit.ado نقل (قول) کردن citi
fakto واقعی fakta در واقع fakte واقعیت، امر
familiara خودمانی شدن familiar.iĝi به‌طور خودمانی familiare خودمانی familiara
flanko از طرف دیگر ali.flanke از یک طرف unu.flanke طرف
frosto نقطه‌ی انجماد frost.o.punkto یخ‌بندان بودن frosti (هوای) یخ‌بندان
hirundo (پروانه‌ی) دُم چلچله‌ای hirund.vost.ulo مربوط به چلچله hirunda چلچله
infekto ضدعفونی کردن sen.infekt.igi عفونی کردن infekti عفونت
jug.lando درخت گردو jug.land.arbo گردویی jug.landa

karvio زیره karvi.hava زیره‌دار sen.karvia بدون زیره
klara روشن کردن، توضیح دادن klar.igi به‌وضوح روشن، واضح
kulturo فرهنگ sen.kultura بدون فرهنگ
kupolo گنبدی شکل kupola گنبدی kupol.forma گنبدی‌شکل
nacio (مجموعه‌ی) ملت‌ها naci.aro بین‌المللی inter.nacia ملت
negi غیرقابل نفی ne.neg.ebla قابل نفی neg.ebla نفی کردن
pruvi بدون اثبات sen.pruve اثبات‌اثبات کردن pruvo
ŝafo گوشت یا خوراک گوشتند ŝaf.aĵo به ŝaf.ido گله‌ی گوشتند ŝaf.aro
sperto آدم بی‌تجربه sen.spert.ulo آدم باتجربه spert.ulo تجربه کردن sperti تجربه
straba (شخص) لوچ strab.ulo لوچی strab.ismo چپ‌چپ straba
unu یکی ساختن unu.igi واحد unuo یگانگی، وحدت unu.eco یک
urtiko گزنه‌ای، سوزشی، خارش urtik.eca احساس خارش و سوزش کردن urtiki گزنه urtiko
vitro شیشه‌ای vitra آبگینه، چیز شیشه‌ای vitr.aĵo شیشه vitro

Ekzercoj

A- Plenigu:

1. La proverboj ekzistas en lingvoj.
2. Ni irananoj bone proverbojn.
3. Ne ĉiu proverbo estas por ĉiuj nacioj aŭ/kaj kulturoj.
4. La persa lingvo estas tre je proverboj.

B- Respondu:


1. Kiu(j) persa(j) proverbo(j) havas saman signifon kiel: “Valoras ne vesto, valoras en.esto”? Traduku ĝin aŭ ilin en Esperanton.
2. Ĉu ekzistas proverboj kun tute kontraŭaj signifoj? Donu ekzemplojn, kaj traduku ilin en Esperanton.

C- Skribu:

1. Traduku kelkajn Esperanto-proverbojn en la persan.
2. Traduku kelkajn persajn proverbojn en Esperanton.

Ĉ- Diskutu:

1. Ĉu sen proverboj interparoloj estus pli fluaj aŭ malpli fluaj?
2. Kio pli ofte okazas: poetoj citas popolajn proverbojn en siaj poemoj, aŭ poem-pecoj transformiĝas en proverbojn.
3. Ĉu ĝenerale persaj proverboj estas kompreneblaj por aliaj kulturoj? Por kiuj pli, por kiuj malpli?

درس بیست و پنجم: شاعران قدیمی ایران			
25-a Leciono: Malnovaj Poetoj de Irano			
			
Ferdoŭsio kaj Moŭlanao: la re.viv.ig.into kaj la etern.ig.into de la persa lingvo ¹			

Pri multaj aferoj, la pli novaj ĉiam estas pli bonaj kaj plaĉaj, tamen rilate al poezio, en multaj okazoj, la mal.novaj ŝajnas prefer.ataj per plej.parto de la homoj. Ekzemple se temas pri la persa poezio, kvankam ni havas bon.egajn poetojn nun.tempajn, kies verkoj, ĉu la rimaj, ĉu la sen.rimaj, vere ĝu.indas, tamen neniu povus aserti ke ies poemo nov.tempa povus egali kun tiu de mal.novaj poetoj kiel Hefezo (1320-1389), Sadio (ĉ. 1215- ĉ. 1290) aŭ Moŭlanao (1207-1273). La freŝ.eco kaj viv.ant.eco de poemoj de tiaj poetoj antikvaj, ĝis nun, post pas.ado de pluraj jar.centoj, neniel mal.pli.iĝis! Ekzemple kiam ni legas:

*Byrge deryĥtane sybz dyr nzyre huŝjar
hyr vyryqyŝ dyfyryst, mawrefyte kerdgar*

**Tut.foli.aro de l' verdaj arboj antaŭ okuloj de l' saĝ.ulo,
Ĉiu-folie en.tenas kajeron da kon.ig.aĵoj pri l' Far.ulo**

kvazaŭ ĝuste nun Sadio ĉe.estas, kaj poemas tion por ni. Aŭ kiam ajn oni ek.vidas la nov.lunon sur.ĉiele kaj aŭtomate deklamas al si:

*Myzrye sybze fylyk didymo dase myhe noŭ
Jadym yz keŝteje ĥiŝ amydo hengame deroŭ*

**La verd.econ de l' ĉielo, kaj la rikolt.il.nov.lunon
Mi ek.vidis kaj memoris faron mian, rikolt.ujon**

kvazaŭ estas la unua fojo ke oni aŭdas la eternan vers.duon de Hafezo.

Eĉ sen.poeziaj verkoj de antikvaj beletr.istoj kaj mistik.uloj ĝuas tian freŝ.econ, kio ver.ŝajnas por.ĉiama. Ekz-e kiam Moŭlana en sia proza verko nom.ita *Fihe Ma Fih* (En ĝi estas, kio ĝin en.estas) diras:

¹ Bildoj de interreto.

Adymi hymiŝe aŝeqe an ĉiz yst ke nydide vy nyŝenideh yst vy fyhm nykyrdeh yst, vy ŝybo ruz an ra mitylybyd. Vy yz anĉe fyhm kyrdeh yst vy dideh yst, mylulo gorizan yst. (p. 113)

La homo ĉiam amas tion, kion li ne vidis, ne aŭdis, nek komprenis, kaj li tag.nokte serĉas tion. Kaj de tio, kion li jam komprenis kaj vidis, li enuas kaj for.kuras.

Aŭ ali.loke en la sama verko:

Moddyti be torŝi ĥu kyrdei; bari, ŝirini ra niz bijazma. (p.227)

Jam pasis longe ke vi al.kutim.iĝis al l' amar.eco; iam, provu ankaŭ la dolĉ.econ.

Ni tute forgesas pri tio ke multaj jar.centoj jam for.pasis ek.de kiam Moŭlana diris tiujn rest.emajn frazojn. Ni sentas lin parol.anta kun ni ĝuste nun tute sincere kaj intime.

La persaj literatur.aĵoj jam traduk.iĝis en multajn lingvojn de la mondo. Esper.anto jam de.longe apartenas al tiuj lingvoj, en kiuj ne mankas pers.aĵoj. Beletre Esper.anto estas tre riĉa kaj kapabla lingvo. Tial, ties literaturo - ĉu la poezia, ĉu la proza - estas tre vasta kaj ampleksa. Samal ankaŭ la traduk.ado de diversaj poezi.aĵoj en ĝin estas tute ebla kaj farinda. Jam ekzistas tradukoj de preskaŭ ĉiuj pli famaj lingvoj en Esper.anto. Eble la unuaj versoj de la persa literaturo, kiuj traduk.iĝis en Esper.anton, estis la robaioj de Kajjam (Ĥyjjam) (ĉ. 1045-ĉ. 1122). Profesoro Gaston Waringhien (1901-1991), elp. Ŭaringien, majstre tradukis multajn robaiojn de Kajjam en Esper.antan poemon. Jen unu el ili:

*Myn hiĉ nydanyĉ ke myra anke sereŝt
yz yhle beheŝt kyrd ja duzyĥe zeŝt!
Ĝamijo botijjo byrbyti byr labe keŝt,
In hyr se myra naqdo tora nesje beheŝt!
**Ne scias mi, ĉu mia Far.int' antaŭ.medite
min al Eden' destinis aŭ al Infero: kvite!
Manĝ.eto, am.idolo kaj vin' sur verda herbo,
jen tri, kontante: via Eden' estas kredite!**²*

Fakte profesoro Waringhien lernis la persan lingvon nur por povi legi Kajjamajn robaiojn en ties originala lingvo. Tion li rakontas en la en.konduko de sia traduko de la robaioj, titol.ita La Robaioj. Tie li, i.a. diras ke unu.a.foje li kon.at.iĝis kun la robaioj tra ne tiel bona traduko de la poemoj en la franca lingvo. Tamen eĉ trans tia

² KAJJAM, Umar. La Robaioj, Trad. G. Waringhien, Antverpeno/La Laguna/Chapeco, TK-Stafeto/Fonto: 1984 (2a eld.), 107 p., robaio numero 30.

traduko, li povis bone percepti la profundan signifon de la robaioj kaj tre kleran kaj klaran menson de Kajjam mal.antaŭ ili.

Multaj kredas ke la Esper.anta traduko de Kajjamaj robaioj estas la plej bona el la ali.lingvaj tradukoj. Ekz-e Armand Robin nomis la Warengnienan verkon “la plej fidela traduko de Omar Kajjam”³. Tian fidel.econ kaj bon.econ, krom la ne.dub.inda majstr.eco de la franca profesoro, kaŭzis la potenco kaj fleks.ebl.eco de la lingvo Esper.anto, kre.ita per alia geni.ulo el Pollando: d-ro L.L. Zamenhof (1859-1917). Nun ĉiu persono en la tuta mondo, kun kiu ajn patrina lingvo, se interes.iĝas pri Kajjam, povas tre facile, tre frue kaj tre mal.kare lerni Esper.anton, kaj ek.legi Kajjamajn robaiojn en “la plej fidela traduko”. Samo povas okazi – kaj jam okazis certa.grade - por ĉiuj aliaj majsto.verkoj de la mondo, kiuj nun estas utilig.eblaj nur por tiuj, en kies patr.ina lingvo la verkoj nask.iĝis. Similo validas ankaŭ pri la sciencaj literatur.aĵoj, sociaj studoj, artaj materialoj, ktp.

Ferdoŭsio per sia verk.ego Ŝahnameo re.viv.igis kaj etern.igis la persan lingvon. Tiel, fakte ankaŭ lia poemo etern.iĝis per la persa. Li mem antaŭ pli ol jar.milo el.diris pri tio kaj pri la rest.emo de la poezio kaj la forto de la lingvo ĝenerale jenel:

*Bynahaje abad gydyd h̄yrab,
ze barano yz tabeše aftar.
Pej yfkyndym yz nyzm kaḥi bolynd
ke yz bado baran nyjabyd gyzynd.*
**Prosperaj konstru.aĵoj detru.iĝos iam fine,
sekve de la pluv.adoj kaj cel.itaĵ sun.radie.
El.konstruis mi el poezio altan palacon,
kiu rezistos kaj la vent.adon kaj la pluv.adon.**

En la nuna mondo Esper.anto povas plen.umi ion similan pri la mondaj literaturoj kaj sciencoj, etern.ig.ante ilin por ĉiuj homoj de la tero tute egale kaj por.ĉiame

کلمه‌ها و ترکیب‌های تازه Novaj vortoj kaj kun.metoj

amara تلخ amar.eco تلخی amar.igi کردن تلخ mal.amara شیرین
aparteni متعلقات aparten.ado تعلق aparten.aĵoj متعلقات
aserti ادعا شده aserto ادعا asert.anto مدعی asert.ita ادعا شده
dolĉa تلخ شیرین dolĉ.eco حلاوت dolĉ.iĝi شدن شیرین mal.dolĉa تلخ شیرین

³ El: La Nouvelle Revue Francaise, Nov. 1958, citita en la antaŭparolo de La Robaioj.

بدون شک sen.dube مبرهن، واضح ne.dub.inda شکاک dub.ema شک داشتن dubi
 در عدن edene عدنی edena (بهشت) عدن Edeno
 ملول شدن enu.iĝi سرحال آور mal.enu.iga ملالت آور enu.iga ملول بودن enui
 گذشته est.into حال est.anto غایب بودن for.esti حاضر بودن ĉe.esti بودن، آستن esti
 جاودان کننده etern.ig.into جاوید ساختن etern.igi ابدی، جاویدان eterna
 بی‌وفا sen.fidela خائن mal.fidela با وفاداری fidele وفاداری fidel.eco وفادار fidela
 انعطاف‌پذیری fleks.ebl.eco قابل انعطاف fleks.ebla منعطف fleksa
 تازه شدن مجدد re.freŝ.iĝi تازگی، طراوت freŝ.eco تازه، باطراوت freŝa
 نابغی geni.ul.eco نابغه geni.ulo نبوغ genio با نبوغ، ژنی genia
 بت‌پرست idol.ano بت‌پرستی idol.kulto بُت، صنم idolo
 افراد خودمانی intim.uloj خودمانی intima به‌طور خودمانی intime
 سال‌نامه jar.libro در پایان سال jar.fine سده، قرن jar.cento دهه jar.deko سال jar
 جلد دفتر kajer.kovr.ilo کیف kajer.ujo دفترچه kajer.eto دفتر kajero
 توانایی، قدرت kapablo قادر ساختن kapabl.igi قادر بودن kapabli قادر kapabla
 مدخل، مقدمه en.konduko به‌داخل هدایت کردن en.konduki هدایت کردن konduki
 نقدینگی kontant.aĵo نقدی kontanta نقد kontante
 اعتبار دادن krediti اعتبار kredito نسبه (براساس اعتبار) kredite
 شروع به دویدن کردن ek.kuri دوان، جاری kur.anta گریختن for.kuri دویدن kuri
 عادت دادن (به) kutim.igi عادت کردن (به) (al.)kutim.igi عادت kutimo
 مهتاب، نور ماه lun.lumo ماه کامل، بدر plen.luno هلال ماه nov.luno ماه luna
 پیش‌اندیشانه، با پیش‌اندیشی antaŭ.meditate ژرف‌اندیشی medit.ado اندیشیدن mediti
 گذشته pas.int(ec)o درگذشتن for.pasi عبران pas.antoj (preter.)گذشتن pasi
 ترجیح prefero مرجع prefer.ata ترجیح دادنی prefer.inda ترجیح دادن preferi
 ناعمیق ne.profunda کم‌عمق mal.profunda عمیق profundo عمیق profunda
 ناموفق بودن، خراب بودن mal.prosperi آباد بودن، روبه‌راه بودن prosperi آباد، روبه‌راه prospera
 درو شده rikolt.ita دروگر rikolt.isto داس rikolt.ilo درو کردن rikolti
 بدون قافیه، سپید sen.rima هم‌قافیه شدن rim.iĝi قافیه rimo
 نادان، جاهل mal.saĝa شخص دانا saĝ.ulo عاقل، دانا saĝa
 افراد صمیمی sincer.uloj صمیمی sincera صمیمانه sincere
 احیاکننده re.viv.ig.into دوباره زنده کردن، احیا کردن re.viv.igi زندگی کردن vivi

Ekzercoj

A- Plenigu:

1. La poemoj de la grandaj persaj poetoj, kiel Sadio, Hafezo kaj Moŭlana ĝis nun konservis sian
2. En la nuntempa beletro de la persa, ĉu la poezia, ĉu la ekzistas multaj majstroverkoj.
3. Poeziaĵoj precipe la malnovaj estas rimaj, sed la prozaĵoj plejparte, ĉu la nunaj, ĉu la malnovaj estas
4. Kiam ajn oni ekvidas la novlunon sur la verdeca ĉielo, oni ekmemoras pri la fama gazalo de
5. Prof. G. Waringhien tre bele kaj fidele tradukis la de Kajjam.

B- Respondu

1. Kio estas la poezio?
2. Kio estas la prozo?
3. Ĉu ekzistas senrima poeziaĵo? Kiel oni nomas tion?
4. Ĉu en la nuntempa poezio de la persa lingvo ekzistas multaj ĝuindaj verkoj? Nomu ties verkintojn.
5. Kion laŭ Moŭlana la homo amas, kaj kion ne?
6. La novluno kion memorigis al Hafezo?
7. Kial profeoro Waringhien lernis la persan lingvon?

C- Skribu:

1. Kiujn persajn poetojn vi pli ŝatas? Kial?
2. Kiujn persajn prozistojn vi preferas? Kial?
3. Prezentu persan verkon, kiu plaĉis al vi.
4. Kion vi dezirus traduki en Esperanton el la persa lingvo?

Ĉ- Diskutu:

1. Kio pli frue aperis en diversaj lingvoj: ĉu la poezio aŭ la prozo?
2. Kio estas diferencoj kaj similaĵoj inter poezio kaj prozo?
3. Komparu malnovan riman poezion kun la nova senrima poezio.
4. Kio estas pli malfacile: verki riman aŭ senriman poeziaĵon?
5. Kio estas la utiloj de tradukado de diverslingvaj materialoj en Esperanton?

درس بیست و ششم: دنیای ایده‌آل

26-a Leciono: La Ideala Mondo



Bertrand Russell, unu el la plej grandaj matematik.istoj kaj filozofoj de la 20a jar.cento¹

La ideala mondo eble diferencas laŭ ĉiu persono, tamen probable ĉies idealaj mondoj ĝuas ankaŭ komunajn karakter.iz.ajojn. Ĉi tie ni pri.parolas dezir.atan mondon, en kiu la homoj povus kun.vivi pli pac.eme kaj harmonie ĉu kun si mem, ĉu kun la aliaj, kaj ĉu kun la naturo.

Bertrand Russell (1872-1970), elp. Rasel, angla filozofo, matematik.isto kaj verk.isto, en sia verko *La Perspektivoj de Industria Civilizacio*² diris:

“Por savi la mondon oni bezonas kredon kaj kuraĝon: kredon pri racio kaj kuraĝon por proklami tion, kion racio montras esti vera.”

En alia verko, titol.ita *Novaj Esperoj por Ŝanĝ.iĝ.anta Mondo*³ Russell dividis la rilat.aron de la homo en tri apartajn grupojn:

1. Inter.ago inter la homo kaj si mem.
2. Inter.ago inter la homo kaj la aliaj homoj.
3. Inter.ago inter la homo kaj la naturo.

Laŭ tiuj ĉi tri kategorioj jene ni traktas la idealan mondon.

Inter.ago inter la homo kaj si mem.

Kvazaŭ la rilato de la homo kun si mem forte de.pendas de liaj rilatoj kun lia ekstera mondo, kion konsist.igas la aliaj homoj kaj la naturo, tiel ke kiam oni ĝuas bonajn rilatojn kun la aliaj, tio bon.efikas lian inter.rilaton kun si mem. Eble oni povus diri ke en homa desegn.ado aŭ kre.ado lia konscienco tiel aranĝ.iĝis ke se li

¹ Foto kaj karikaturato de interreto.

² The prospects of industrial civilization

³ RUSSELL, Bertrand. *New hopes for a changing world*, New York: Simon & Schuster, 1951

bon.kondutas kun siaj sam.speci.uloj, lia konscienco re.kompencos tion per interna gaj.iĝo; kaj certe ankaŭ la malo validas, t.e. se li mal.bon.kondutas kun la aliaj – kvankam li ŝajne eble eĉ akiras materialan profiton provizoran – lia konscienco ne lasos lin komforta: li ne ĝuos trankvilon, ne dormos komforte, mal.havos pozitivan inter.agon kun si mem, lia labor.forto mal.pli.iĝas, ktp. Eble tial la frap.frazo de la plej nova filmo de Bahman Farman-ara (1941-), nom.ata *jek buse kuĉulu* t.e. Kis.eto aŭ Kiel Kis.eto, estas: “Se via konscienco estas komforta, morto estas kiel kis.eto.”

Samo validas pri la homa konduto kontraŭ la naturo. La ĉefaj elementoj, kiuj est.igas la naturon estas: la aero, la akvo (fontoj, riveroj, lagoj, maroj, ...), la tero (minoj, montoj, ...) kaj la bestoj. Kiam oni faras ion bonan aŭ bon.rezultan pri ĉiu el la naturaj elementoj, oni sentas sin interne gaja kaj kontenta. Ekz-e se iu plantas arbon kaj bone kresk.igas ĝin, ĉiam kiam li vidas la arbon, li sentas bone kaj kontente en sia eno. Male, se ali.ulo faras ion kontraŭ natur.aĵo, ekz-e poluci.igas river.akvon kaj tio mort.igas ties fiŝojn, li ĉiam mal.bon.sentos vid.ante – aŭ eĉ re.memor.ante pri la rivero kaj la pere.intaj fiŝoj.

Interago inter la homo kaj la aliaj homoj.

Iu.sence ankaŭ la aliaj homoj estas parto de la naturo. Homo apartenas al la animaloj, sed ne al bestoj, probable ĉar la homo – laŭ nia scio – estas la nura mem.konscia viv.anto sur la tero, kiu ankaŭ ĝuas tre progres.intan kaj precizan lingvon. Ĉiu.okaze havi inter.rilaton kun la aliaj homoj povas esti pli mal.facile ol kun la aliaj natur.aĵoj, unue ĉar la homaj re.agoj ne estas tiel facile antaŭ.vid.eblaj kiel estas pri la besoj kaj aliaj natur.aĵoj, kaj due ĉar neniu homo estas kiel la alia, ĉu laŭ.aspekte, ĉu laŭ la kondutoj kaj pens.maniero. Eble tial laŭ ŝejko Abu-Said Abol-Ĥejr (967-1049), unu el la plej grandaj mistik.uloj iranaj, la plej malfacila miraklo de la homo estas lia viv.ado kun la aliaj homoj:

Nian ŝejkon oni diris: “Iu persono voj.iras sur la akvo!”

Li diris: “Tio facilas! Ankaŭ rano kaj paser.eto povas iri sur.akve.”

Oni diris: “Alia persono flugas en la aero!”

Li diris: “(Ankaŭ) korniko kaj muŝo flugas en la aero.”

Oni diris: “Iu persono dum momento iras de urbo al alia urbo!”

La ŝejko diris: “Ankaŭ satano dum unu en.spiro iras de oriento al okcidento; tiaj agoj ne estas tiel valoraj. La (mirakla) viro estas tiu, kiu povas vivi inter la popolo kaj inter.agi kun ili kaj kun.iĝi kun la popolo, kaj dume (eĉ) momenton ne forgesi pri la dio.”

Inter.ago inter la homo kaj la naturo.

Unu el la ĉefaj karakter.iz.aĵoj de la nuna erao, estas la ekolog.iaj katastrofoj, kiujn la homo kaŭzis en diversaj partoj de la tero. Feliĉe oni jam tion konstatis kaj komencis mal.pli.igi la poluci.igon de la medio.

Se ni rigardu historie, unue la homo estis kapt.ita en la manoj de la naturo, kaj li nenion povis fari kontraŭ ĝi. Ekz-e, post mal.lum.iĝo, li nenion povis fari, krom la dorm.ado, aŭ li nenion sciis pri inundoj kaj aliaj kataklismoj, sekve la homo kapablis fari nenion por kontraŭ.stari ilin. Iom.post.iome, la homa scio kaj kapablo pli.iĝis tiel, ke nun fakte la naturo estas grand.parte kapt.ita en la manoj de la homo. Esper.eble future la homo lernos inter.agi kun la naturo tiel, ke nek la naturo nek la homo en.danĝer.iĝos.

Ŝlos.ilan rolon en tiu ĉi rilato ja ludas la brul.aĵoj. Se la homo vere povos trovi kaj util.igi sen.polucian energi-fonton, anstataŭ la nunaj fosiliaj hejt.aĵoj – kiel la petrolo, gaso, ligno ktp – multaj hom.far.itaj problemoj sur la tero fin.iĝos.

کلمه‌ها و ترکیب‌های تازه kun.metoj kaj novaj vortoj

agis متقابل، تعامل inter.agi واکنش، عکس العمل re.agi عمل کردن، کنش داشتن
civilizacio مربوط به قبل از تمدن antaŭ.civilizacia مربوط به تمدن civilizacia تمدن
danĝero به‌خطرانداختن en.danĝer.igi به‌خطر افتادن en.danĝer.iĝi خطر
desegni طرح desegn.aĵo طراح desegn.anto طراحی desegn.ado طراحی کردن desegni
deziri آرزوهای خوش bon.deziroj مورد تمایل dezir.ata میل داشتن deziri
dividi تقسیم نشده ne.divid.ita قابل قسمت divid.ebla تقسیم کردن dividi
ekologo بوم‌شناختی ekologi.bوم‌شناسی ekologi.bوم‌شناس ekologi.b
filozofo فلسفی filozof.ia فلسفه filozof.io فیلسوف filozofo
harmonio ناهماهنگ ne.harmonia هماهنگ harmonia هماهنگی harmonio
ideala آید آلیست، آرمان‌گرا ideal.isto آید آلیسم، آرمان‌گرایی ideal.ismo آید آله آل، آرمانی ideala
industrio صنعتی شدن industri.iĝi صنعتی industria صنعت industrio
inundo سیل آسا inunde با سیل فراگرفتن inundi سیل، طغیان inundo
iri باز رفتن، دوباره رفتن re.iri رهرو، راه‌رونده voj.ir.anto راه رفتن voj.iri رفتن iri
karaktero وجه مشخصه karakter.iz.aĵo مشخص کردن karakter.izi شخصیت، نهاد karaktero
kataklismoj مانند بلایای طبیعی kataklisme مربوط به بلایای طبیعی kataklisma بلایای طبیعی kataklismoj
kategorio به‌طور مقوله‌ای یا مُتقن kategorie مقوله‌ای، مُتقن kategoria مقوله kategorio
konduito خوش‌رفتاری کردن bon.konduiti رفتار کردن konduiti رفتار konduito

konsisti تشکیل شدن konsist.igi دادن تشکیل konsist.aĵoj دهنده تشکیل
 kontenta راضی mal.kontenta راضی شدن kontent.iĝi راضی kontenta ناراضی
 korniko کلاغ kornik.ido کلاغ کوجه kornik.ino ماده کلاغ
 kredi معتقد، مومن krad.anto اعتقاد، باور، ایمان kredo اعتقاد داشتن، باور داشتن
 krei مخلوق، آفریده kre.ito خالق، آفریننده kre.anto خلق کردن، آفریدن
 kuraĝo بدون شجاعت sen.kuraĝa شجاعانه kuraĝe شجاع kuraĝa شجاعت، شهامت
 matematiko ریاضی دان matematik.isto ریاضی matematika ریاضیات
 muŝo مگس سرکه vinagr.o.muŝo مانند مگس muŝe مگس
 okcidento به طرف غرب okcident.e.n انسان غربی okcident.ano غربی okcidenta غرب
 oriento به سوی شرق orient.e.n انسان شرقی orient.ano شرقی orienta شرق
 paco قهر mal.paco صلح آمیز paca صلح دوست pac.ama صلح گرا pac.ema صلح
 pasero گنجشک کوچک paser.eto بچه گنجشک paser.ido گنجشک pasero
 pendi مستقل، بدون وابستگی sen.de.penda بستگی داشتن de.pendi آویزان بودن
 pereinti نابود شده، فنا شده pere.inta نابودی، فنا pere.anto فانی pere.anto نابود شدن
 perspektivo بدون دورنما، sen.perspektiva به صورت دورنما perspektive دورنما (ی سه بعدی)
 بدون آینده
 polucio بدون آلودگی sen.polucia آلوده کننده poluci.iga آلوده کردن poluci.igi آلودگی
 proklami اعلام شدن proklam.iĝi اعلام، اعلان proklam..ado اعلام کردن
 racio خردگرایی raci.ismo خردمندانه racia خرد، عقل
 rano بچه وزغ کوچک ran.id.eto وزغ کوچک ran.eto بچه وزغ ran.ido وزغ
 rilato ربط دادن rilat.igi دراین رابطه ĉi.rilate روابط متقابل inter.rilatoj رابطه
 ŝanĝi بدون تغییر sen.ŝanĝa متغیر ŝanĝ.iĝ.anta تغییر یافتن ŝanĝ.iĝi تغییر دادن ŝanĝi
 satano مثل شیطان satene شیطان مانند satan.eska شیطانی satana شیطان satano
 ŝlosi کلیدی (مهم) ŝlos.ila کلید ŝlos.ilo قفل کردن (کلید کردن) ŝlosi
 specio زیرگونه sub.specio مربوط به گونه specia گونه، نوع (حیوانی یا گیاهی) specio
 spirado تنفس spirado بازدم el.spiro دم en.spiro تنفس کردن spiri
 trakti مقاله trakt.aĵo بررسی trakt(.ad)o بررسی کردن trakti
 valoro ارزش (چیزی را) داشتن valori چیزهای با ارزش valor.aĵoj با ارزش valora ارزش valoro
 vivi پر از زندگی، سرشار از viv.o.plena زندگان viv.antoj هم زیستی viv(.ad)o زندگی کردن vivi
 حیات

Ekzercoj

A- Plenigu:

1. Bertrand Russell estas angla, matematikisto kaj verkisto.
2. Laŭ Russell homaj interrilatoj povas dividiĝi en kategoriojn.
3. La plej granda miraklo laŭ ŝejko Abu-Said estas vivi inter la
4. Por poluciigi la medion, la brulaĵoj havas rolon.
5. Unu el la ĉefaj karakterizaĵoj de la nuna tempo, estas la ekologiaj, kiujn la homo kaŭzis sur la tero.

B- Respondu:

1. Kiel oni povas dividi la rilataron de la homo?
2. Kiel ŝanĝiĝis la rilatoj inter homo kaj la naturo dum la historio?
3. Ĉu nun la naturo estas en la manoj de la homo, aŭ male?
4. Kio estas Bertrand Russell?

C- Skribu:


1. Kion la homo povas fari nun kontraŭ la kataklismoj?
2. Skribu pri filozofo aŭ/kaj filozofio, kiu pli plaĉas al vi.

Ĉ- Diskutu:


1. Kia estus la ideala rilataro inter la homo kaj la naturo?
2. Kiel niaj rilatoj kun la naturo povas efiki niajn rilatojn kun la aliaj homoj?
3. Ĉu la homo povos venki ĉiujn naturajn fortojn? Ĉu tio dezirindus?
4. Ĉu la homa rilato kun si mem ne estas la ĉefa kaŭzo de ĉiuj malbonaj rilatoj?

درس بیست و هفتم: نانوتکنولوژی

27-a Leciono: Nanoteknologio



Art.ista imago pri nanoboto (**nano.teknologia roboto**): la nanoboto kapt.inte ruĝan globulon, kaj povas injekti ion rekte en la globulon, kaj povas mal.injekti (el.suĉi) likvaĵon el ĝi pere de sia nano.injekt.ilo.¹



Nano.teknologio ĉefe signifas konstrui ion atomon post atomo: nano.teknologia planeda dent.rad.et.aro.²

